

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2020. №4



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2020. №4 (306)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@mail.ru

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2021

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2020, №4 (306).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 30 декабря 2020 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Temo 5

Paweł Fischer-Kotowski. Fernando Maia Jr.: La Esperantisto de la Jaro 2020.	6
Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2020	7
Paweł Fischer-Kotowski. Fernando Maia Jr.: UEA havas ĉion por esti pli forta ol nun: Intervjuo kun Fernando Maia Jr.	8

Eventoj 13

Przemysław Wierzbowski. Bjalistoko: Zamenhof-Tagoj kun maskoj	14
Mesaĝo de UEA okaze de la Zamenhof-tago	16
Mesaĝoj de Espero – Zamenhofa Tago 2020	17
Novaj membroj en la Panteono.....	17
Povilas Jegorovas ricevis parlamentan medalon.....	18
Povilas Jegorovas. Litovio dum la pandemia jaro	19
Irina Gonĉarova. Jubilea KER-ekzameno en Moskvo	21
Duobla seminario en Ĉinio	22
Wu Guojiang. Liaoning: Kurso reta kaj ĉeesta.....	23
Mireille Grosjean. Afriko: Seminario de SSB por afrikaj virinoj	24
Nova estraro en Hispanio.....	24
Sonja Zaretskaia. La unua reta KAEST	25
Irina Gonĉarova. Moskva lingva festivalo: avantaĝoj de la virtualeco	26
Francesco Maurelli. Reta Edukado Nun.....	28
La 106-a UK: “Paco kaj konfido: universalaj valoroj”	29
UEA kongresos en Torino en 2023	30
VVK: Reviviga projekto de la Virtuala Kongreso.....	31
UEA invitas prelegi en Belfasto	31
CED reorganiziĝas sub la nova estraro	32
Nekrologoj	33

Tribuno 34

Dietrich Michael Weidmann, Mirejo Grosjean. Malfermita letero de Svisa Esperanto-Societo	35
Stanislav Belov. Granda skismo en Esperantujo.....	38
Xavi Alcalde. Pri duolingva paradokso.....	43

Demisiis Corsetti, estro de la financa UEA-komisiono	44
Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Homaj Rajtoj	45
Dua senkongresa jaro? Iru al kulturcentroj	46
Daniel Onesra. Ekzistas tria vojo	46
Stanislav Belov. Nevideblaj viktimoj de la pandemio	47

Arkivo 50

Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2021	51
---------------------------------------------------------------------	----

Lingvo 53

Věra Barandovská-Frank. Pri "lingua franca"	54
Du novaĵoj de la Akademio de Esperanto	64
Subvencioj de ESF	64
Sukcesa 3a Interlingvistika seminario en Lombardio	65
Nova serio de <i>Esperantologio / Esperanto Studies</i>	66

Kulturo 67

Aleksander Korĵenkov. La arta potenco kaj kompleteco	68
Miĥail Ŝoloĥov. La kvietaj Dono: Romanfragmentoj / Trad. A. Korĵenkov	73
Ewa Grochowska. Junecaj revoj	89
Katalin Kováts. Manlibro pri instruado	93
Paulo Sérgio Viana. Du ringoj	94
Laure Patas d'Ilhiers. Memorflokoj	96
Georgi Mihalkov. Literatura konkurso "Hristo Gorov – Hrima"	98
Wolfgang Kirschstein. Persefono seksuma en infero	99
Miguel Fernández. Memorinda paĝo de la historio de la hispanlingva literaturo: la modernismo	101
Carlo Minnaja. BLK (Recenzo: <i>Baza literatura krestomatiko</i>)	111
Valentin Melnikov. Ĉiujare samloke... (Recenzo: <i>Belarta rikolto 2020: Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio</i>)	113
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , Junio 2020, Nº38	115
Kalibro 90: la numero 308 de <i>Literatura Foiro</i>	116
Belartaj Konkursoj de UEA en 2021	117

Sur la kovropaĝo estas vintra foto de la Moskva esperantisto Aleksej Salomatov. Ni fermas la jaron 2020 kaj kune kun Aleksej deziras al vi Gajan Kristnaskon kaj Bonan Jaron 2021!

Temo



Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2020 Fernando Maia Jr., kiu estas la unua sudamerikano kun ĉi tiu honora titolo! (Foto: Anna Striganova; Lahtio, 2018).

Fernando Maia Jr.: *La Esperantisto de la* *Jaro 2020*

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Koppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016), Trezoro Huang Yinbao (2017), Hori Jasuo (2018) kaj Anna Löwenstein (2019).

En 2020 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis por la 23a fojo. Ĉi-jare 17 kandidatigantoj proponis 23 kandidatojn, al kiuj 17 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Fernando Maia Jr. – 6 voĉoj

Halina Gorecka – 4 voĉoj

Peter Balaž, Ahmad Mamduhi, Edoardo Nannotti, Yves Nevelsteen – po 3 voĉoj
Du kandidatoj ricevis po du voĉojn, ses kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Fernando Maia Jr. estas 37-jara brazila geologo, ekde 2019 vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio. En la jaro de la kronvirusa pandemio li iniciatis kaj realigis retan okazigon de la Universala Kongreso sub la nomo “Virtuala Kongreso de Esperanto”. La reta kongreso okazis kun aliaj Esperanto-aranĝoj kadre de la pli granda MondaFest’, kio ebligis almenaŭ retan partoprenon al pluraj novaj esperantistoj.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2020 Fernando Maia Jr., kiu estas la unua sudamerikano kun ĉi tiu honora titolo!

Paweł Fischer-Kotowski
sekretario

Legu pli pri la projekto La Esperantisto de la Jaro en nia retejo
<http://esperanto-ondo.ru/Ind-jaro.htm>

Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2020

Proponantoj:

Marija Belošević (Kroatio): prezidantino de IKUE

Marek Blahuš (Ĉeĥio): eksestrarano de E@I, vikimediano, komputila lingvisto, akademi-
ano

Renato Corsetti (Britio): akademiano, eksprezidanto de UEA

Klára Ertl (Hispanio): estrarano de TEJO

Edmund Grimley Evans (Britio): akademiano, eksprezidanto de EAB

Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano

Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro

Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT

Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto, recenzisto, akademiano

Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro, akademiano

James Rezende Piton (Brazilo): konsilanto de BEL, aktivulo de Skolta Esperanto-Ligo

Sibayama Zyun'iti (Japanio): estrarano de JEI, ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*

Chuck Smith (Usono/Germanio): kunfondinto kaj teknikestro de *Amikumu*

Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ

José Antonio Vergara (Ĉilio): engaĝita observanto de la fenomeno Esperanto

Paulo Sergio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto

Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio): prezidanto de IKEF, direktoro de Ĉina Esperanto-libro-
servo, komitatano de ĈEL

Elektantoj:

Peter Baláž (Slovakio): kunordiganto de E@I

Osmo Buller (Finnlando): eksa Ĝenerala Direktoro de UEA

Petr Chrdle (Ĉeĥio): posedanto de la eldonejo KAVA-PECH

Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE

Mireille Grosjean (Svislando): prezidanto de ILEI

Anne Jausions (Francio): eksprezidantino de OSIEK

Reza Kheir-khah (Tajvano): redaktoro de *Formoza Folio*

Ilona Koutny (Pollando): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM

Katalin Kováts (Nederlando): lingvisto, metodologo, redaktoro de edukado.net, akademi-
ano

Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko, akademiano

Trezo Huang Yinbao (Ĉinio): vicprezidanto de UEA, direktoro de Esperanto-Centro

Ora Ponto

Vasil Kadifeli (Turkio): tradukanto, eldonanto de *Turka Stelo*

Tahira Masako (Japanio): kunlaboranto de KAOEM

Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de kooperativo *Esperanto-Gastigejo*
en Lesjöfors

Roland Rotsaert (Belgio): redaktoro de *Monato* pri ekonomio

Syōzi Keiko (Japanio): membro de la Redakta Fakto de JEI, iniciatinto de *Libroteko Tokio*

Przemysław Wierzbowski (Pollando): prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo

Sekretario:

Paweł Fischer-Kotowski (Pollando)



UEA havas ĉion por esti pli forta ol nun

Intervjuo kun Fernando Maia Jr.

Kiel vi reagis al la novaĵo pri la honora titolo, kiun vi ricevis? Kiel vi fartas kiel la Esperantisto de la Jaro 2020?

Plej sincere mi iugrade konsterniĝis. Kiam mi ricevis la novaĵon, mi konsciis, ke tio okazis ĉefe pro la laboro ĉirkaŭ la Monda Festivalo de Esperanto aŭ MondaFest' 2020. Kaj tiu konsterno venis de la konscio, ke nenio pri MondaFest' estus okazinta sen giganta kolektiva klopodo. Fine mi kompreneble ĝojis pro la agnosko, sed neniel tio temu pri agnosko al mia persono, tamen al la komunuma forto, kiun mi nun havas la privilegion kaj respondecon reprezenti. Nome de tiu

komunumo, mi estas sincere dankema al *La Ondo de Esperanto* kaj al la teamo de la konkurso pro la nomumo.

Kiun rolon Esperanto plenumas en via vivo?

Esperanto estas kara ĉiutaga lernilo kaj laborilo. Per ĝi mi sukcesas ĉiutage lerni pri la mondo kaj pri la vivo per aliro al diversaj vidpunktoj, ĉu foraj, ĉu proksimaj – en lernado, kiu ne limiĝas al la movado, tamen kiun mi sukcesas apliki en aliaj kampoj de mia vivo. Per ĝi, Esperanto, mi ankaŭ sukcesas realigi laborojn pri temoj al mi gravaj, kiuj laŭ miaj kredoj kaj komprenoj devus havi pli da spaco en la socio kaj inter la individuoj, precipe kultura riĉigo, kio kutimas havi kiel naturan sekvon la emancipiĝon de la homoj el la sistemoj – pro la memkomprenado kaj pro la kompreno de la medioj.

Via ĉefa merito en 2020 estas MondaFest', kadre de kiu okazis Virtuala Kongreso de Esperanto, reta anstataŭajo por la montreala UK. Vi estis motoro de tiuj agadoj. Kiujn defiojn vi alfrontis?

La giganta laborŝarĝo de tiuj agadoj povas reprezenti la aron da defioj ĉirkaŭ ili. Kaj se ili sukcesis, estis pro tio, ke ne nur mi, sed aro da homoj plenanime akceptis plenumi ĉiu siajn taskojn, ne malofte volontule memproponinte. La limojn de tiu iugrade hazarda teamo ne eblas facile koni, ĉar la afero MondaFest' iras multe trans la Estraron de UEA aŭ E@I, kiuj havis la honoron reprezenti la okazigon de la evento. Mi mencias la Estraron, ĉar sen la decido de miaj kolegoj kaj iliaj konstantaj kaj plurmanieraj subtenoj, tio ne okazus; kaj E@I, ĉar sen ilia malavara sperto kaj plenkora aliĝo al la ideo same nenio okazus. Ĉar mi decidis fari menciojn, mi ankaŭ ne povus ne mencii la membrojn de la malgranda organizteamo, de la montreala LKK kaj de la laborgrupo pri la kongresa temo; la laborteamon de UEAviva; kaj la amikojn de la Irana Esperanto-Asocio, krom ĉiuj aliaj amikaj organizoj kaj individuoj, kiuj estis parto de MondaFest', inkluzive de *Vinilkosmo* kaj la artistoj ĝenerale. Se nun mi respondas tiun intervjuon, estas grandparte ne pro mi, sed pro ili.



Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj

ZAMENHOFA TAGO
15 Decembro, 2020



ESPERANTO, monda lingvo, estas la plej facila lingvo kaj la plej justa solvo por protekti la lingvajn rajtojn de ĉiuj.



<https://uea.org> • <https://m.facebook.com/universala.esperanto.asocio/>

Ĉi-sezone nian primovadan rubrikon “Eventoj” kutime inaŭguris artikol(et)oj pri la festado de la Zamenhofa Tago en multaj landoj, sed la pandemia jaro korektis la menuon de la vintra “Ondo”.

Bjalistoko: Zamenhof-Tagoj kun maskoj

En la vivo de nia Esperanto-societo decembro estas monato aparta. La semajnfinojn plej proksiman al la 15a de decembro okupas Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj – ĉi-jare por la 21a fojo. Kvankam ankoraŭ antaŭ du monatoj regis la espero, ke gastoj el landoj proksimaj kaj malproksimaj povos kunveni en la naskiĝtago de Lazaro Ludoviko, la disvolviĝo de la pandemio niajn planojn tute ŝanĝis. Necesis transiri en la retan mondon. La tuta programo okazis do ĉe la platformo Zoom.

Tradicie la naskiĝfestoj de Doktoro Esperanto konsistis el du tagoj prelegaj-koncertaj, kaj unu kun ekskurso. La programo estis ĉefe en la internacia lingvo, krom du intervjuoj: por neesperantistoj Centro Ludoviko Zamenhof proponis intervjuojn kun Jeremi Galdamez pri la kvaronjara revuo *Karta*, kies freŝa numero estis dediĉita ĉefe al la temo “Lingvo kontraŭ malamo. Esperanto 1887-2020”, kaj kun Zosia Dzierżawska, la aŭtorino de la ilustraĵoj por la libro *Doktoro Esperanto kaj la lingvo de espero*, kiu lastatempe aperis en pola traduko.

Parto de la tempo estis por Bjalistoko. Nina Pietuchowska parolis pri la historio de nia urbo en la 19a kaj 20a jarcentoj. Ni ankaŭ resumis la literaturan konkurson





dediĉitan al la temo de la jaro "Pandemio: neĉiutaga ĉiutageco", kiu okazis por la 10a fojo sub alta protektado de la urbestro, kaj anoncis la gajnintojn.

La literatura konkurso estas organizata kunlabore de Bjalistoka Esperanto-Societo kaj la biblioteko Podlaŝia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko. Menciindas fervora helpo de Elżbieta Karczewska laboranta en la Esperanto-biblioteko, filio n-ro 14 de la Libraro, kiu iniciatis la konkurson kaj de dek jaroj ĝin popularigas.

En eta grupo, kun la Bjalistoka urbestro Tadeusz Truskolaski, kiu parolis al la partoprenantoj, ni metis florojn al la malnova monumento de Zamenhof – kaj ĉar de du jaroj ni havas novan, tiun de knabo, la junan

Ludovikon ni ornamis per rubando.

Ĉar ĉi-jare ne okazis la pola Esperanto-kongreso, ni deziris proponi al aliaj Esperanto-centroj de nia lando doni tempon al sinprezentoj. La ideon akceptis Krakovo (Adam Wilkus: Esperantaj Tagoj de Krakovo en la tempo de kronviruso), Poznano (Ilona Koutny pri la interlingvistikaj studoj), Sopoto (spektaklo pri Perkuno) kaj Vroclavo (muzika konkurso de Silezia Esperanto-Asocio kaj Eŭropa Centro de Interkultura Edukado prezentita de Małgosia Komarnicka).

Krome estis prezentoj de: Szabolcs Szilva pri lia nova lernolibro, Rafał Darasz pri la historio de Esperanto en Ĉinio, Alexandra Paz pri judoj en Portugalio kaj prezento de volontulado en Tuluzo. Danke al Paweł Fischer-Kotowski kiel la unuaj ni ekkonis la esperantiston de la jaro 2020: Fernando Maia (vd. p. 6).

Dimanĉe okazis la tradicia ekskurso – kun Ines Kahin kaj Iza Walentynowicz ni transportiĝis virtuale al la urbeto Supraśl. Neatendite ni havis ankaŭ ne-virtualan naskiĝtagan kukon bakitan de Nina Pietuchowska.

La ceteron de la lasta tago plenigis trejnado de trejnistoj kadre de la programo Erasmus+, en kiu pluraj en niaj asocioj realigas siajn projektojn. La programon kompletigis lingvo-kvizo kaj tri bonetosaj koncertoj: de *Frey-Lech Trio* kaj *Uku-Donaco* el Bjalistoko, Tim Gallego el Germanio kaj *Kajto* el Nederlando.

Entute partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj. Se vi ne sukcesis veni, iom post iom ni aldonas registraĵojn de la aranĝo al nia Youtube kanalo <https://www.youtube.com/user/Babelturo/videos>.

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Foto: Gediminas Kartanas

Povilas Jegorovas ricevis parlamentan medalon

Printempe *La Ondo* informis, ke la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas la 27an de marto 2020 devis ricevi la memormedalon “Tarnaukiete Lietuva!” (Servu al Litovio) de Gabrielė Petkevičaitė-Bitė, kiun la Litovia parlamento (Sejmo) atribuis al li pro la multjara efika laboro en Esperanto-movado. Sed pro la pandemiaj kvarantenaj limigoj la solena ceremonio estis prokrastita kaj okazis la 5an de oktobro en la gimnazio Juozas Balčikonis de Panevėžys. Pro la ankoraŭ nefiniĝinta koronavirusa pandemio la ceremonio estis pli modesta ol kutime, kaj la kvanto da partoprenantoj estis limigita al cent personoj.

Komence la partoprenantoj vizitis la tombon de Gabrielė Petkevičaitė-Bitė en la urba tombejo de Panevėžys. La solenan ceremonion gvidis aktoro de drama teatro de Panevėžys Albinas Keleris. Unue li prezentis ĉiujn 16 personojn, al kiuj estis atribuita la medalo, kaj listigis iliajn meritojn. Sekvis salutparoladoj de la prezidanto de Litovia parlamento prof. Viktoras Pranckietis, la urbestro de Panevėžys Rytis Mykolas Račkauskas, kaj prezidanto de la parlamenta komisiono kiu decidas pri la laŭreatoj de la medalo, verkisto Stasys Kašauskas.

Post muzika paŭzo la prezidanto de la parlamento Viktoras Pranckietis kaj la urbestro Rytis Mykolas Račkauskas disdonis la medalojn.

Post ĉiuj kvar enmanigoj sekvis muzikaj paŭzoj kaj spektaklaj epizodoj pri Petkeviĉaitė-Bitė, kiun rolis Eleonora Koriznaitė – aktorino de la dramteatro de Panevėžys. La solena ceremonio finiĝis per komuna fotosesio kaj akcepto de la urbestro.

La ceremonion partoprenis la vicprezidantino de la Esperanto-klubo “Revo” de Panevėžys Danutė Kriščiūnienė kaj Povilas Šiaučiūnas – pro la pandemiaj limigoj ĉiun dekoriton rajtis akompani nur du personoj. La parlamenta retejo vaste informis pri la evento kaj prezentis la premiitojn, materialo pri la ceremonio aperis en multaj amaskomunikiloj.

Litovio dum la pandemia jaro

La jaro 2020 por la tuta mondo estas eksterordinara. Ĝi signis la tutan vivon per diversaj defioj, limigoj, prokrastoj, nuligoj k. s. Ankaŭ en Litovio la esperantista agado devis obei al la reguloj de la pandemio, adaptiĝi al nekutimaj kondiĉoj, ion rifuzi, prokrasti, tamen la agado ne ĉesis, kaj en kelkaj direktoj ĝi estis eĉ pli aktiva, ol kutime.

Pro la pandemio ni devis nuligi ĉi-jaran kongreson de Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj Zamehof-Tagojn 2020, kiuj ĉiujare okazas meze de decembro. Tamen ĉio alia okazis.

Unue, oni devas mencii la fruktodonan kunlaboron de LEA kun la litovlingva retejo “Mano kraštas” (Mia lando). Rezulte de tio LEA dum la tuta jaro havis kaj havos estonte sian apartan rubrikon, kie ni konstante publikigis intervjuojn kaj artikolojn pri esperantista agado.

Dum la jaro en la retejo jam aperis entute 120 tre diversaj artikoloj kaj intervjuoj de 115 litoviaj esperantistoj el 30 urboj, sekve, proksimume unu teksto ĉiun trian tagon. En tiuj publikaĵoj niaj esperantistoj rakontis pri sia vojo al Esperanto, pri sia esperantista agado. Tiu ĉi informkampanjo pri Esperanto kaj esperantistoj por nacilingva publiko estas senprecedenca kaj unika en la mondo. La kampanjo daŭros ankaŭ sekvontjare. Surbaze de tiuj intervjuoj kaj artikoloj ni planas eldoni apartan libron en la litova lingvo.

Alia direkto de la kunlaboro kun “Mano kraštas” estas retaj lecionoj de Esperanto por litovlingvanoj. La lecionojn preparas Gražina Opulskienė kaj Aida Čižikaitė. Ĝis nun ni tion ne havis. Sed en la reta epoko nacilingva retkurso de Esperanto estas simple necesa. Jam aperis 38 ilustritaj lecionoj. Tio daŭros. Informoj pri la kurso aperis ankaŭ en la retejo de Litoviaj sciencistoj, en la retejo pri edukado kaj instruado, en la retejo de Litoviaj ĵurnalistoj kaj en aliaj gravaj retejoj.

Ĉiujn publikaĵojn en “Mano kraštas”, ligitajn kun Esperanto, vidu ĉi-tie:

<https://www.manokrastas.lt/page/lietuvos-esperantininku-sajunga>.

Dum la jaro daŭris la migrado de la Zamenhof-ekspozicio tra diversaj urboj de



Litovio. Pro la pandemio kaj kvaranteno ĝi paŭzis dum tri monatoj printempe kaj somere kaj dum du monatoj aŭtune kaj vintre. Pro tio ĉi-jare la ekspozicio okazis nur en ses urboj. Tamen post la dua kvaranteno ĝi plu vojaĝos tra Litovio. La ekspozicio en ĉiu urbo estas akompanata per vasta informado

pri Esperanto. La migrado de la ekspozicio daŭras jam dum kvar jaroj, kaj ĝi daŭros ankoraŭ kelkajn jarojn.

Kvankam prokrastita de printempo al aŭtuno, en septembro en Aukštadvaris okazis jam la 13a seminario de esperantistoj-ĵurnalistoj.

Litova Esperanto-Asocio vaste menciis la 160-jariĝon de la naskiĝo de la unua litova esperantisto, la aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto por litovoj, la unua prezidanto de Litova Esperanto-Asocio kaj la unua redaktoro de *Litova Stelo* prelato Aleksandras Dambrauskas. En lia naskiĝloko Pagiriai en septembro okazis speciala aranĝo, aperis ampleksa ilustrita artikolo pri li kiel esperantisto en kvar paperaj tutlandaj gazetoj kaj en 12 retejoj.

Same vaste estis menciita la 80-jariĝo de unu el la plej konataj nuntempaj litovaj esperantistoj prof. Aloyzas Gudavičius – pri li kiel esperantisto aperis 12 ampleksaj publikaĵoj en diversaj litovlingvaj gazetoj kaj retejoj.

Grava ĉi-jara evento estis lanĉo de la litovlingva beletra libro de Rugilė Audeinienė kun la Esperanta titolo *Vojaĝo*, kies enhavo baziĝas sur la vivo de la avo de la aŭtorino, siatempe aktiva esperantisto, kaj la libro multe rakontas pri tio. La libro elvokis grandan interesiĝon ĉe litoviaj amaskomunikiloj – aperis pli ol dek publikaĵoj pri ĝi en gazetoj kaj retejoj. La libro estis prezentita en la prestiĝa Vilna librofoiro en februaro kaj en kelkaj urboj de Litovio.

En Litovio bone funkcias interna informado de esperantistoj – konstante funkcias la retejo, dissendolisto kaj Facebook-paĝo de LEA. Ĉi tiuj tri informkanaloj estas renovigataj ĉiutage per kelkaj aktualaj informoj.

Petras Čeliauskas tre intense laboras pri sia granda Esperanta-litova vortaro kaj kompilas enciklopedion kaj historion de la Litovia Esperanto-movado. Tradukoj el la litova lingvo de Antanas Vaitkevičius ofte aperas en *Turka Stelo*.

Grava evento estis la atribuo de la Litovia parlamenta medalo “Tarnaukite Lietuvai” de Gabrielė Petkevičaitė-Bitė al la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas (vidu p. 18). Tio estas fakte altnivela ŝtata distingo de la agado de la tuta Litovia esperantistaro.

Litova Esperanto-Asocio jam prepariĝas al la vicaj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET), kiuj en 2022 devos okazi en Litovio.

Ni optimisme finas la nunan jaron kaj venas al la 2021a jaro, kiu, espereble, estos multe pli bona, ol estis la finiĝanta jaro.

Povilas Jegorovas

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Jubilea KER-ekzameno en Moskvo

La 28an de novembro en Moskvo okazis la deka, jubilea sesio de KER-ekzameno. Samtage en la 12 landoj de la mondo pasis la naŭa sesio. Jes, niaj sesioj antaŭas la alilandajn ekde la unua jaro de la monda ekzameno laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, kiam Moskvo ricevis premie kroman, parolan, sesion pro plej granda kvanto de partoprenantoj en la unua KERA jaro – 2011a.

La ekzameno estis ĉeesta. Malgraŭ la strikte rekomendata reĝimo de memizoligo en la Ruslanda ĉefurbo, la sesio sukcesis kolekti la bezonatan minimumon de ekzamenatoj – kvin homojn: po du por la niveloj B1 kaj B2 (Denis Nesterenko kaj Aleksandr Gasin / Ruslan Zujev kaj Roman Ralko) kaj unu por la nivelo C1 (Kira Poliŝĉuk). Ni dankas ilin pro la riskemo trafi dekhoman kompanion dum la pandemio, pro la kuraĝo kontroli siajn sciojn kaj pro la diligenta laboro dum la ekzameno.

Por la raportanto estas speciale agrable menciiti, ke ĉiuj kvin ekzamenitoj estas membroj de Moskva Esperanto-Asocio MASI, same kiel la gastigantoj de la ekzameno: post la fermo de ĉiuj moskvaj bibliotekoj Oleg Ĉajka kaj Arina Osipova afable kaj helpeme akceptis la sesion sabate en sia oficejo. Kiel kutime, ankaŭ la regaladon de ĉiuj ĉeestantoj prizorgis MASlanoj.

La tutan administran laboron faris Svetlana Smetanina. Nikolao Gudskov malpakis la koverton kun la taskoj. Tiel rezultis, ke tri estraranoj de la landa asocio REU kontribuis la okazigon de la internacie grava Esperanto-evento.



Kaptante raran ŝancon de ĉeesta renkontiĝo, ni gratulis al Svetlana Smetanina okaze de la proksimiĝanta jubileo kaj al Roman Ralko okaze de la ĵusa 17-jariĝo. Por ricevi donacojn okaze de sia 16-jariĝo venis Petro Fedosov, kiu antaŭe jam plenumis siajn skriban kaj parolan ekzamenojn de la nivelo C1. Al Peĉjo estis sole ne enmanigita la freŝa numero de la revuo *Sennaciulo* (2000, №9-10) kun lia unua granda publikigaĵo en la internacia Esperanto-gazetaro.

La etoso estis malstreĉa kaj kutime bonamika, estis malfacile disiĝi post la ekzameno. Teumante, ni babilis pri kurantaj aferoj, cetere, pri la proksimiĝanta Moskva Lingva Festivalo, organizata de du geĉeestantoj, ja al la programo kontribuos ankaŭ Nikolao, Romĉjo, Peĉjo kaj Kira. Kun la junuloj ni pensis pri sekvaj ĉeestaj renkontiĝoj.

Ĉiu KER-sesio estas por ni vera festo! Koran dankon al ĉiuj!

Irina Gonĉarova

kunorganizanto de Moskvaj KER-sesioj

kunordiganto de MEA MASI

Duobla seminario en Ĉinio

Por festi la Zamenhofan Tagon, la 14an de decembro okazis Seminario de Ĝeneralaj Sekretarioj, kiu estis organizita de ĈEL (Ĉina Esperanto-Ligo) per la apo VooV Meeting. La seminario rolis samtempe kiel la 71a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). La temo estas “En 2021 kiel kreive antaŭenpuŝi Esperanto-movadon”. Partoprenis preskaŭ 90 esperantistoj, krom ĉinoj ĉeestis ankaŭ koreaj samideanoj.

Yu Tao, vicprezidanto de Ĉina Internacia Eldona Grupo kaj vicprezidanto de ĈEL, gratulis la seminarion videe. Li diris, ke antaŭnelonge la ĉina registaro diskutis pri praktikado de la “Dekkvara Kvinjara Plano”, en kiu kreivo kaj disvolvo ludos tre gravan rolon, kaj Ĉinio pli kaj pli malfermiĝos. Kiel disvolvi Esperanton en ĉi tiu situacio estas tre pripensinda kaj diskutinda temo. Li esprimis sian esperon, ke per la komuna diskutado kaj cerbumado oni povos esplori novan vojon por disvolvi kaj progresigi la Esperanto-movadon.

Ĉi-jare estas la 40a datreveno de la aliĝo de la Ĉina Esperanto-Ligo al UEA, en la tre memorinda jaro la okazigo de la nuna seminario sendube profundigas la rilatojn inter la du asocioj.

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La 3an de novembro 2020 en Zaragozo je sia centa vivojaro forpasis

Antonio Marco Botella (1921-2020)

hispana tekstilisto kaj esperantisto (1937), Esperanto-instruisto kaj movad-organizanto, redaktoro de *Kajeroj el la Sudo* (1988-96) kaj *Boletín* (1989-97), prezidanto de “Fundación Esperanto” (2008-19), esploranto de historio de Esperanto, precipe en Hispanio; tradukinto kaj aŭtoro de pluraj libroj en la hispana kaj en Esperanto, interalie: *Kronikoj el la Historio de “Frateco”* (1983), *Analoj de la Esperanta movado en Hispanujo 1887-1953* (2 vol., 1987), *Lirikaj perloj de Al-Andalus* (Trad., 1995), *Laboristaj kronikoj pri la hispana Esperanto-movado* (1996), *Esperanto en la Valenciana komunumo* (2001), *Esperanto en Katalunio. 1887-1987* (2005), *Hispana Lirika Antologio* (Trad., 2015) k. a.; laŭreato de la premio Ada Sikorska Fighiera (2007).

La 4an de novembro 2020 en Rostov-na-Donu (Ruslando) en sia 80a vivojaro pro koronaviruso forpasis

Boris Aleksejeviĉ Zozulja (1941-2020)

sovetunia kaj ruslanda inĝeniero, programisto kaj esperantisto (1975); fondinto de la eldonejo *Verda Kukolo*, ĉe kiu aperis pluraj libroj kaj broŝuroj, inkluzive de liaj propraj verkoj: *Plumprovo* (1994), *Ne stumblu ĉe gramatiko!* (1995), *Эсперанто-русский словарь “ложных друзей переводчика”* (1995), *Dialogoj pri religio* (1997), *Sociopolitikaj konceptoj de L. L. Zamenhof* (1997), *Poltergejst’ ne kulpas* (1999) k. a.

La 12an de decembro 2020 en Beogrado pro mallonga grava malsano forpasis

Johan Derks (1940-2020)

nederlanda instruisto (i.a. dum kvar jaroj en Afriko), sociologo kaj esperantisto. Li lernis Esperanton en 1955, sed aktiviĝis nur en 1994; en 2002 li iĝis kasisto kaj sekretario de EEU, sed baldaŭ ekŝiĝis pro malkonsento kun la estraro; en 2007-10 li estis B-komitatano de UEA, sed malsukcesis en la du sekvaj komitataj elektoj (2010, 2013). Derks predis por demokratiigo de UEA kaj en 2011 eldonis sian studon *Gvidilo por komitatanoj* (2011).

Johan Derks estis prezidanto de la fonduso “Esperanto en Evoluo”, kiu helpis starigi Esperanto-centron en Rumongo (Burundo), kaj kunordiganto de la grupo “Tutmondeca Esperanto”. En 2007, edziĝinte kun la serba esperantistino Svetlana Milanoviĉ, li ekloĝis en Beogrado, kie li eldonis kaj redaktis sian trimonatan revuon *Balkana Verda Stelo* (2015-17) kaj klopodis aktivigi Esperanto-asociojn de Balkanaj landoj.

Ni funebras kaj kondolencas.

**Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov**

Tribuno



La Esperanta gazetaro daŭre malkreskas, sed ŝajnas, ke la apero de nova gazeto kun Esperanta titolo en Japanio ĝojigas ne ĉiujn esperantistojn (vd. p. 35-37).

Malfermita letero de Svisa Esperanto-Societo

al Japana Esperanto-Instituto kaj ĉiuj esperanto-institucioj kaj individuaj esperanto-aktivuloj en Japanio rilate la peton de la firmao Gutenberg Orchestra registri komercmarkojn “Esperanto” kaj “Esperanto Cultural Magazine” por revuoj kaj publikaĵoj paperaj kaj retaj

Karaj gesamideanoj

Nin ŝokis mesaĝo, kiu atingis nin antaŭ kelkaj tagoj tra pepanto en la reto, ke iu japana firmao Gutenberg Orchestra deponis ĉe la Japana Patentoficejo 5 la formalan peton registri markon “Esperanto” kaj “Esperanto Cultural Magazine” por revuoj kaj publikaĵoj paperaj kaj retaj. La registrado de la nomo de nia lingvo fakte deprezus al ni estonte sen la permeso de la entrepreno Gutenberg Orchestra publikigii ion sub la nomo Esperanto ĉu papere ĉu rete, kaj tion fakte ne nur en Japanio, sed pro la efiko de la Pariza Interkonsento pri markoj en ĉiuj pli ol 100 membroŝtatoj de la konvencio.

Pro tio fakte la registrado de tia marko ne estas “privata” afero de japanaj esperantistoj, sed la japanaj esperantistoj havas la sanktan taskon protekti nian spiritan havaĵon, protekti nian propran nomon kontraŭ tia atako. Ni ŝokiĝis, ĉar ni legis tre naivajn komentojn de kelkaj gravaj reprezentantoj de nia movado en Japanio, sed ankaŭ en aliaj landoj pri la bona intenco de Gutenberg Orchestra labori por nobla



celo kiel la monda paco. Ni ne neas la noblan celon de tiu revuo “Esperanto Cultural Magazine”, kiun ni konsultis en la reto, kaj ni havas nenion kontraŭ tio, ke iu uzas la nomon Esperanto por pozitiva agado. Kio tamen ne eblas, estas, ke iu postulas la ekskluzivan rajton pri la nomo Esperanto por si mem kaj siaj propraj celoj, kaj tion multe pli, kiam ne temas pri demokrata institucio de publika asocio, en kiu ĉiu individuo rajtas demokrate kundecidi kaj kiu troviĝas sub publika kontrolo, sed pri privata komerca institucio, kiu ja fine celas nenion alian ol gajni monon. Agi kiel kapitalisma entrepreno por si mem ne kondamnindas, sed kondamnindas, se tia entrepreno volas ŝteli al ni nian nomon kaj depreni al ni la rajton estonte publike labori por Esperanto sen ilia eksplicita permeso.

Ni aŭdis, ke Japana Esperanto-Instituto la 26an de decembro 2020 havos kunvenon, en kiu ili decidis siajn pluajn paŝojn, tial mi apelacias al ĉiuj gepartoprenantoj de tiu kunveno, ke ili konsciu pri sia respondeco al nia movado. Ni ankaŭ eksciis, ke la 7an de januaro Japana Esperanto-Instituto planas kunsidon kun la estroj de la entrepreno Gutenberg Orchestra. Devas esti tute klare, ke Japana Esperanto-Instituto memkompreneble povas kunlabori kaj/aŭ kontribui al tia revuo de la firmao Gutenberg Orchestra, sed tio ne signifas, ke Japana Esperanto-Instituto aŭ povas aŭ rajtas permesi al Gutenberg Orchestra registri markon “Esperanto” kun la celo publikigi revuojn.

Svisa Esperanto-Societo jam estas en kontakto kun UEA, kaj la estraro de UEA prenas la aferon tre serioze kaj dividas nian opinion plenplene, ke en neniu maniero la Esperanto-movado devas akcepti la registradon de marko “Esperanto” aŭ “Esperanto Cultural Magazine” por publikado de revuoj kaj ke ni al ĉiuj patentaj oficejoj en la mondo devas klare signali, ke la vorto “Esperanto” apartenas al la neprotekteblaj vortoj, almenaŭ kiam temas pri kultura aktiveco kaj publikigado de revuoj. Ni fakte tiu-okaze devas atentigi, ke tiu ĉi ne estas la unua tia provo kaj ke jam en diversaj formoj ekzistis registrado de markoj de Esperanto eĉ foje de franca papeterio por publikaĵoj, kiuj fakte ne estis rimarkitaj, ĉar tiuj entreprenoj ne serioze uzis la markon, kaj en tiu kazo la marko simple estingiĝis en 2010. Krome ekzistas registrado de “Esperanto” por vino kaj vestaĵoj aŭ diversaj aliaj servoj, kiuj ne rilatas al nia movada aktiveco, tiuj lastaj estas limkazoj, sed en estonto nia movado devas tre zorge observi tiun evoluon kaj ankaŭ jam por la estonto malebligi tiajn registrado-provojn. Estas feliĉo, ke ĝis nun tia registrado ne sukcesis kaŭzi damaĝon al Esperanto, sed ni esperantistoj estonte ne povas naive fermi niajn okulojn al tiu temo. Ni devas protekti nian kulture heredaĵon kaj nian kulture identecon!

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Granda skismo en Esperantujo

Ĉu vi rimarkis ke en Esperantujo okazis granda skismo? Kaj temas ne pri idistoj, riistoj aŭ similaj reformemuloj. La dividlinio kuŝas oble pli profunde, kaj verŝajne ĝi formiĝis jam en la tempo de Zamenhof. Mi esperas ke tiu skismo daŭros.

Vivi en Esperanto

Por klarigi la aferon mi donos unu ekzemplon. Mi havas aŭton kaj uzas ĝin jam dek jarojn. Mi ŝatas ĝin, ŝoforas akurate kaj regule venigas ĝin al priservado. Sed mi tute ne scias, kiel ĝi funkcias kaj, plej grave, mi ne deziras scii tion. Ĉar por mi la aŭto estas nura veturilo, kiun mi uzas por praktikaj celoj, sed kiu per si mem ne interesas min. Esperanton mi traktas same.

Antaŭ ol eklerni ĝin, mi dum tri tagoj umis en Interreto, klopodante kompreni, ĉu ĝi vere funkcias aŭ estas nur amuza projekto. Trovinte konfirmojn de la efektiva uzado de la Lingvo Internacia mi plonĝis je ĝia lernado kaj post tri monatoj je ĝia uzado – kaj mi neniam bedaŭris tion.

Mi mem nomas min praktika idealisto, ĉar mi opinias, ke idealismaj celoj atingeblas per praktikaj rimedoj. Por klerigi homojn necesas ebligi aliron al scioj, por elimini rasismen necesas atingi socian egalecon, kaj por ebligi liberan kaj efikan cirkuladon de la informoj necesas komuna lingvo – esprimiva, preciza kaj facile lernebla. Nome pro tio mi lernis Esperanton – ne pro kredo je lingva justeco aŭ tutmonda frateco.

Ekde tiam mi uzas ĝin ĉiutage kaj tre kontentas pri la rezulto. Jam dek jarojn mi uzas Vikipedion, kie nombro da artikoloj jam triobliĝis, kaj kie mi mem plurfoje trovis informojn vere utilajn, mankajn en aliaj lingversioj. Mi vojaĝas per Esperanto, kaj tio ne kompareblas kun vojaĝoj aĉeteblaj en agentejoj – same kiel pladoj de nacia kuirarto ne kompareblas kun hamburgero el rapidmanĝejo. Mi legas librojn, gaze-tojn kaj retejojn, kaj trovas tie informojn, interesajn kaj utilajn.

Laŭeble mi reciprokas Esperanton, aktive uzante ĝin por same praktikaj aferoj – verkante blogaĵojn kaj vikipediajn artikolojn, kreante lingvokurson pri praktika uzado de la rusa, komunikante per Esperanto en sociaj retoj, tradukante diversajn tekstojn ktp. Mi kelkfoje partoprenis en UKoj, sed preskaŭ neniam vizitas klubojn aŭ aliajn Esperanto-aranĝojn, nek partoprenas en movadaj aferoj (mi iĝis dumviva membro de UEA nur por subteni ĝin kaj ĝui rabaton en ĝia Libroservo, ŝajne baldaŭ malaperonta). Alivorte, mi uzas la lingvon same kiel mi uzas la aŭton – aktive kaj plezure, sed pure praktike.



Obsedo ĝis frenezo

Mi pensis ke tio estas normala afero, ja oni tutmonde lernas la lingvojn por paroli en ili, sed ne pri ili. Mi denaske parolas la rusan kaj ĉiutage legas en la angla, sed mi neniam interesiĝis pri ili, nek membras en iuj lingvogrupoj. Des pli mirigis min, ke esperantistoj tiom ŝatas babili pri Esperanto. Nome babili – ne uzi ĝin praktike, sed simple umi pri la lingvo. Ĉiuj Esperanto-grupoj plenas je bildetoj kun verdaj flagoj kaj kliŝaj frazoj kiel “Mi amas Esperanton!” aŭ “Esperanto estas mia lingvo, la mondo estas mia patrujo!” ktp. Ĉu vi vidis tion en iu ajn nacilingva komunumo?

Foje tio atingas nivelon de obsedo. Kiam mi ekverkis en Vikiversitato kurson “Kantu ruse!”, destinitan por infanoj, lernantaj la rusan, sub respektiva afiŝo ĉe Fejsbuko tuj aperis indigna komento de fervora esperantisto. “Kial vi klopodas helpi al la rusa? Milionoj da homoj jam uzas ĝin. Kantu esperante!” Mi provis klarigi, ke temas ne pri helpo al la rusa, kiu apenaŭ bezonas ĝin, sed pri pure praktika afero – uzado de Esperanto kiel lingvo-peranto, ebliganta lerni aliajn lingvojn. Mia oponanto estis ŝtone malcedema: “Ĉu vi erare opinias, ke esperantistoj devas krei lernolibrojn pri ĉiuj 6000 lingvoj? Verku pri Esperanto!” postulis li. Mi ne plu perdis tempon por tiu senfrukta diskuto, sed la senlaca babilanto, evidente ne zorganta pri sia tempouzo, spuris miajn afiŝojn pri “Kantu ruse!” en Fejsbuko kaj sub ĉiu skribis unu frazon: “Kantu Esperante!” Ĉu konata bildo?

Tiaj frenezaĵoj renkonteblas en Esperantujo ĉiupaŝe. Antaŭ kelkaj semajnoj, kiam ankoraŭ daŭris milito en Montara Karabaĥo, mi tradukis kelkajn artikolojn el la internacia projekto Tutmondaj Voĉoj kaj metis referencojn en la Fejsbuka grupo “Esperanto en Armenio”, al kiu oni iam aligis min. Temas pri tekstoj, dediĉitaj al historio kaj nuntempa stato de la konflikto, pri lingvaj disputoj rilate tieajn toponimojn, pri vidpunktoj de fakuloj ambaŭflanke ktp.

Sed tuj sekvis plendoj de armenaj naciistoj, postulantaj ke tie aperu nur tekstoj, komplete subtenantaj ilian pozicion kaj baldaŭ post tio ĉiuj artikoloj estis forigitaj el la grupo sub preteksto, ke “tiu grupo nomiĝas ne “Politiko en Armenio”, sed “Esperanto en Armenio”, do ili estas malkonvenaj ĉi tie”.

La plej amuza afero, evidenta por ĉiu vizitanto, estas ke tio estis solaj afiŝoj en tiu ĉi grupo rilataj samtmepe al Esperanto kaj Armenio. Post ilia forigo restis nur amaso da kliŝaj publikaĵoj, plenigantaj ĉiun ajn Esperanto-grupon – citaĵoj el la Esperanto-Biblio, kantoj de senlaca Esperanto-artisto kaj sennombraj verdaj flagetoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Pri la duolinga paradokso

Koncerne la (mal)kreskon de la Esperanta movado, ni vivas en paradokso. La nombro de novaj esperantistoj ekkonantaj la lingvon per interreto daŭre multobliĝas. Verŝajne neniam en la historio estis tiom da homoj eklernintaj la internacian lingvon. Dume la asocioj stagnas kaj dronas en problemoj, ekonomiaj kaj ne nur. Tiel eblas analizi diversmaniere la staton de la movado.

Ĉi tie mi argumentos, ke la fenomeno de la *duolinganoj* tre pozitivas, sed ni riskas ne profiti de ĝi, se ni prezentas Esperanton nur kiel lingvon. Kontraŭe, se oni vidas ĝin kiel la ĉefan trajton de socia movado celanta al plibonigo de la mondo, estos pli da ŝancoj, ke pli da tiuj novaj Esperanto-parolantoj fariĝos aktivuloj. El tiu perspektivo substrekindas la interna ideo de la lingvo.

Ja veras, ke historie pluraj gvidantoj de la movado klopodis distanciĝi de politikaj kaj sociaj grupoj, eĉ de la pacifistoj. Tiam Esperanto estis “danĝera lingvo”, kiu pli danĝeris, se oni vidis politikajn rilatojn de ĝiaj parolantoj, ĉefe kun la laborista movado. Tamen ankaŭ veras, ke la historio de nia movado enhavas aron da diskonigindaj etikaj faroj, pri kiuj respondecas konataj kaj malpli konataj esperantistoj. En la rubriko *Memorindaj Esperantistoj* de la brazila *Heroldo de Esperanto* mi pritraktis kelkajn el ili. Kaj mi daŭrigas la serion ĉe *Monato*.

Ekzemple, Domènec Masachs, barcelona anarkiisto, kiu klopodis murdi diktatoron pere de ponardo. Profunde pacema, li prenis tiun frenezan decidon por damaĝi nur la hispanan registarestro. Aŭ Alice Herz, juddevena germanino, kiu migris al Usono por fuĝi de la nazia reĝimo. Inluite de la neperforta rezistado de budhismaj monaĥoj, ŝi decidis sin bruligi por protesti kontraŭ la rolo de la usona registaro en la vjetnama milito. Aŭ la svedo Valdemar Langlet, kiu kune kun sia edzino, la esperantistino Nina Borovko, estas agnoskita kiel “Justulo inter la Popoloj” pro tio, ke ili savis milojn da judoj en Budapeŝto dum la Dua Mondmilito. Aŭ la ĉeĥo Přemysl Pitter, kiu kune kun sia kunlaborantino Olga Fierz (ambaŭ ankaŭ “Justuloj inter la Popoloj”) ne nur savis judojn kaj aliajn persekutatojn de la nazia reĝimo; post la fino de la milito ili ankaŭ protektadis centojn da germanaj infanoj kontraŭ la venĝa konduto de la ĉeĥoslovaka loĝantaro. Aŭ la irlandano Francis Sheehy-Skeffington, pioniro en la defendo de inaj rajtoj, kiu edziĝis al la aktivulino Hanna Sheehy, kies familinomon li adoptis kiel parton de sia nomo. Longtempa subtenanto de neperforto, li estis tamen mortpafita de la brita armeo dum la tiel nomata Paska Ribelo en 1916. Aŭ la usonano William Pickens, la unua konata nigra esperantisto, kiu estis ankaŭ praaktivulo pri la rajtoj de la afrik-usonanoj. Aŭ multaj aliaj memorindaj esperantistoj.



Jen agaro radikale humanisma fare de homoj, kiuj decidis oferi parton de sia vivo pro konvinko profunde homisma. Miaopinie, elstarigante tian historion, la Esperanta movado pli efike sukcesus teni, kiel aktivaj movadoj, parton de la novaj interesitaj homoj. Tio estas: komprenigante al ili, ke: ni ne estas nur samlingvanoj, sed ankaŭ *samideanoj* (kompreneble, tio ne signifas, ke ni pensas la samon pri ĉio); ni ja interesiĝas pri la ĉefaj defioj de la ekstera mondo: rifuĝintoj, malegaleco, plurdimensia diskriminacio, klimata ŝanĝiĝo kaj multaj aliaj; ni pretas kunlabori kun frataj sociaj movadoj; ni havas mirindan ilon je la dispono de tiuj necesaj luktoj por alia ebla mondo.

Xavi Alcalde

Demisiis Corsetti, estro de la financa UEA-komisiono

(**HeKo**) D-ro Renato Corsetti demisiis kiel financa komisionestro de UEA. Li opinias ke “per la aprobo fare de la komitato de ĉiuj punktoj en la financa raporto, finiĝis la tasko de la financa komisiono rilate al la movoj por reekvilibrigi la financon de UEA. Nun ne plu estas tempo por debati kaj konsili, nun estas tempo por ke la estraro decidu kaj faru la unuajn paŝojn por konkretigi la rekomendojn”.

La eksa komisionestro admonas plu: “Tio jam estus devinta okazi en la pasintaj monatoj. Mi petas, ke fine de novembro la estraro ne venu ankoraŭ kun proponoj pri aliaj alternativoj esplordaj. Se ni antaŭeniros laŭ tio, kion Duncan diris (“En 2021 ne okazos io”), tio ankaŭ signifos, ke en 2022 ne okazos io, ĉar temas pri elektojaro, kaj ĉiuj estos pensantaj nur pri la elektoj, kaj la nova estraro ekfunkcios komence de 2023”.

Ĉu la admono (“senkonsidera trudo”, laŭ komitatano Rob Moerbeek) de Corsetti malkaŝas la taktikon de la nuna estraro (specife de prezidanto Duncan Charters kaj de direktoro Martin Schaeffer), nome alveni ĝis la sojlo de la procedo, sed plenumigi ĝin fare de la posta estraro? Ja neniu ŝatas la rolon de eŝafodisto...

La eksa komisionestro plu minacas: “Mi foriris de la financa komisiono, sed mi restas en la komitato, por kontroli la agadon de la estraro, kaj mi intencas daŭre puŝi por ke la estraro decidu kaj plenumu la movojn jam aprobitajn de la komitato: a) liberiĝi de la libroservo; b) liberiĝi de la biblioteko; c) aŭtomatigi la administradon por funkcii per volontuloj; d) ludoni la konstruaĵon en Roterdamo por havi monon por uzi por nia centra celo: disvastigi Esperanton”.

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nevideblaj viktimoj de la pandemio

La koronavirusa pandemio jam pereigis pli ol 1,7 milionojn da homoj kaj ĉiutage al tiu nombro aldoniĝas kelkaj miloj da viktimoj. Multaj famaj artistoj, verkistoj kaj politikistoj forpasis, trafitaj de tiu ĉi plago. Tamen inter ĝiaj viktimoj multas ankaŭ homoj, kiujn ni vidas ĉiutage, sed apenaŭ rimarkas – kurieroj de manĝoliveraj servoj.

Formikoj en uniformo

La ĉefa rimedo, aplikata tutmonde kontraŭ la disvastiĝo de la koronaviruso, estas trudizoliĝo. Milionoj da homoj restis hejme dum monatoj, foje sen havi permeson eliri surstraten. En grandaj urboj multaj al kutimiĝis almenaŭ parte manĝi hejme, sed pluraj homoj – speciale gejunuloj aŭ altpagataj fakuloj – tute ne kuiras hejme. Por ĉiuj ĉi homoj manĝoliveraj servoj iĝis vera savilo.

Tiu komerco rapide kreskis, sed dum la pandemio ĝi preskaŭ eksplodis danke al drasta multiĝo de la mendoj. Eĉ se vi ne interesiĝas pri tiu ĉi industrio, vi certe rimarkis, ke surstrate aperis multe da hastantaj homoj en firmaaj uniformoj kun kvadrataj dorsosakoj. Iuj preskaŭ kuras, aliaj rapidas sur skutiloj aŭ bicikloj, iuj veturas en ĉipaj aŭtoj. Ili estas kurieroj – formikoj de la manĝoliveraj servoj, soldatoj de la granda armeo. Kiel ĉiuj soldatoj ili batalas en ombro de sia armeo kaj mortas nerimarkitaj.

En Ruslando ĉi tiun merkaton regas “Yandex Manĝaĵoj” (Yandex.Eda) kaj “Delivery Club”. Ambaŭ apartenas al plej grandaj retserĉiloj – Yandex kaj Mail.ru, profitantaj sian unikan eblecon trovi la mendantojn kaj ligi ilin kun produktantoj kaj kurieroj per siaj mapo-servoj. Tio ebligas al iu ajn elekti per respektiva retejo aŭ aplikaĵo inter miloj da pladoj, proponataj de centoj da restoracioj kaj ricevi ilin hejme. Liverado okazas ĝis la pordo, kutime ene de duonhoro, kaze de malfruiĝo sekvas rabato. Komforte kaj tute sekure, ĉu ne? Sed tiujn komforton kaj sekurecon ni ŝuldas grandparte al la menciitaj formikoj – kurieroj, kies nomoj aperas en nia memoro post la ricevo de informa mesaĝo kaj forglitas senspure tuj post la ricevo de la mendo.

Ŝajnas ke ili devus esti same kontentaj kaj ĝojaj kiel iliaj dungantoj – ju pli abundas la mendoj, des pli grandas la kurieraj enspezoj, ĉu ne? Sed la vivo montris ke en la kapitalisma ekonomio tiu logiko ne funkcias. Post alfronti subitan kreskon de la mendoj, la manĝoliveraj servoj anstataŭ varbi proporcian nombron de kurieroj preferis pli intense ekspluati la jamajn dungitojn. Oni vastigis la areojn, kiujn devas priservi ĉiu kuriero, mallongigis la tempon de la liverado kaj enkondukis pliajn monpunojn – speciale pro malfruoj. La servoj ekĝuis monfluojn, dum iliaj “soldatoj” anhele hastas, klopodante plenumi la normojn.

Ilia situacio jam pli frue estis ekstreme malbona, kaj foje tio aŭdiĝis en amas-komunikiloj. En aprilo 2019 en Sankt-Peterburgo mortis la 21-jara kuriero, kiu post dekhora labortago falis morta de sur sia biciklo. Post tio la servo ebligis al la kurieroj memstare preni paŭzon, preminte specialan butonon en la aplikaĵo (antaŭe ili devis peti pri tio sian estron) kaj promesis malfermi “varman linion”, kien ĉiu kuriero povos

telefoni kaj anonime rakonti pri siaj problemoj. “Delivery Club” reagis, promesinte al kurieroj ĉiujare libervolan medicinan ekzamenadon. Ĉu grandaj atingoj?

Al tio respondis kurieroj de la lasta firmao, kiuj ekribelis en julio 2020, deklarinte senfinan strikon. Tricent strikantoj diris, ke ekde majo ili ne ricevas salajrojn. Multaj devis forlasi luitajn loĝejojn kaj nokti en parkoj, pluraj frontis malsaton.

La situacio malboniĝas pro tio, ke en grandaj urboj tiun laboron ofte plenumas enmigrintoj – subedukitaj junuloj el Centra Azio, kie post la disfalo de Sovetunio la vivnivelo draste falis, kaj la laborpostenoj malmultiĝis. Sen profesio kaj ofte sen bona kono de la rusa lingvo ili estas kondamnitaj al tiu laboro, akceptanta ĉiujn marŝkapablajn personojn.

Hejme ilin atendas la maljunaj gepatroj kaj propraj familioj, por kiuj ili ofte estas la sola fonto de enspezoj. Sed nun ili mem transformiĝis el monhelpantoj je mizeruloj, trafitaj de la striktigo de la reguloj kaj la samtempa falo de la kurzo de la rublo. Ili gajnas malpli, sed devas sendi pli al siaj familioj, kaj ankaŭ iliaj propraj elspezoj altiĝis pro la ĝenerala kresko de la prezoj, sekvinta la kurzoŝanĝon. Perfekta kaptilo, ĉu ne?

“Ĉu ili almenaŭ gajnas multe?” – naivulo demandus. La manĝoliveraj servoj parolas pri 2500-3000 rubloj tage (34 ĝis 41 usonaj dolaroj), sed eĉ tiu bildo estas troigita. Mia fratino, kies edzo enmigris el Taĝikio kaj laboris kiel kargoportisto kontraŭ 25 mil rubloj monate (340 dolaroj), foje pensis, ke tio povus esti porokaza kromlaboro. Sed eksciinte, ke en la realo la kuriero malofte gajnas pli ol 900 rublojn tage (12 dolaroj), ŝi preferis pasigi tiun tempon kun siaj kvar infanoj.

Lukto kontraŭ nebulo

Kiel reagis la servoj? Ilia respondo estas tipa por la nuntempa kapitalismo, kies ĉefaj trajtoj estas monopolismo kaj malpersoniĝo de la respondeco. “Yandex Manĝaĵoj” klarigis, ke la kurieroj laboras en partneraj firmaoj, kiuj respondecas pri iliaj laborhoroj. La kurieroj mem elektas sian laborotempon, kiu varias de 4 ĝis 12 horoj. Monpunoj kaj laborkondiĉoj ankaŭ dependas de la partneraj firmaoj, kiuj dungas la kurierojn. Simile respondas “Delivery Club”. Kaj tio estas vera!

La manĝoliveraj servoj fakte estas nuraj perantoj inter la mendintoj kaj produktintoj. Ili konektas ilin per siaj retejoj kaj aplikaĵoj kaj transdonas informojn al la tria flanko – firmaoj, kiuj dungas la kurierojn. Kaj tiuj lastaj ne zorgas pri sia reputacio aŭ socia respondeco – ili staras malantaŭ la bela fasado de siaj partneroj, ili estas konataj al neniu kaj do zorgas nur pri unu afero – profito.

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



*Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas
la amikoj ekparolas.*

La 1891a jaro estas memorinda en nia literaturo. Tiujare naskiĝis kelkaj gravaj verdplumaj verkistoj, inkluzive de la januaruloj Julio Baghy kaj Nikolao Hôhlov.

Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2021

3. Antaŭ 75 jaroj mortis **Jean Borel** (1868-1901-1946), svisa ĵurnalisto, eldonisto, volapukisto kaj esperantisto, dum pli ol 40 jaroj loĝinta en Berlino; kunfondinto (1902) kaj vicprezidanto (1902-03) de Svisa Esperanto-Societo, de la eldonejo Esperanto-Verlag Möller & Borel (1903; de 1912 Ader & Borel, de 1923 Ellersiek & Borel) kaj de la gazeto *Esperantistische Mitteilungen* (1904; de 1905 *Germana Esperantisto*) kiun li redaktis dum 1904-10; defonda membro de la Lingva Komitato (1905-14); aŭtoro de popularaj lerniloj, tradukinto de *Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj* de P. Mérimée (1926), kiu aperis inter 30 libroj en la serio *Esperanta Biblioteko Internacia* fondita de li en 1909.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 41-42.

6. Antaŭ 105 jaroj mortis **Harold Bolingbroke Mudie** (1880-1902-1916), angla borsisto kaj esperantisto, fondinto kaj redaktoro de *The Esperantist* (1903-05), vicprezidanto (1908-12) kaj prezidanto (1912-16) de BEA, unu el la tri ĉeforganizantoj de la 3a UK (Kembridge, 1907), kunfondinto de UEA (1908) kaj ĝia unua prezidanto ĝis sia morto.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 207-209.

13. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Gyula "Julio" Baghy** (1891-1911-1967), hungara aktoro, reĝisoro, oficisto kaj esperantisto: instruisto, verkisto, aktoro kaj movadano; kunprezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1947-50), prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro (1955-60), prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio (1960-65); membro de la Lingva Komitato (1924-48), membro (1929-67) kaj vicprezidanto (1938-51) de la Akademio de Esperanto; kunredaktoro de *Literatura Mondo*; aŭtoro de *Preter la vivo* (1923), *Viktimoj* (1925), *Pilgrimo* (1926), *Dancu, marionetoj!* (1927), *Migranta plumo* (1929), *Hura!* (1930), *Printempo en la aŭtuno* (1931), *La vagabondo kantas* (1933), *Sur sanga tero* (1933), *Verdaj Donkiĥotoj* (1933), *La teatra korbo* (1934), *La verda koro* (1937), *Sonĝe sub pomarbo* (1958), *Koloroj* (1960), *Ĉielarko* (1966) k. a.; honora membro de IEL-UEA (1937).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 19-20.

14. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (Рублёв, 1901-1919-1979), rusa sovetunia inĝeniero pri kemio kaj esperantisto, membro de la Lingva Komitato (1929-38), aŭtoro de kelkaj Esperanto-lerniloj, tradukinto de pluraj rusaj literaturaĵoj, inkluzive de la libroforme eldonitaj poeziaĵoj de I. Krilov (1979) kaj A. Puŝkin (2002).

16. Antaŭ 35 jaroj mortis **Hu Yuzhi** (1896-1913-1986), ĉina redaktoro, eldonisto, tradukisto kaj kulturaganto (direktoro de instituto pri eksterlandaj aferoj, direktoro de la ŝtata informa kaj eldona administracio, vicministro pri kulturo,

vicprezidanto de la komitato pri reformado de la ĉina skribo, deputito kaj vicprezidanto de la Konstanta komitato (la supera organo) de la Ĉina Popola Kongreso (la ĉina parlamento), prezidanto de CK de la Ĉina Demokratia Ligo k. a.) kaj esperantisto konata en Esperanto kiel **Hujucz**; kunfondinto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio (1919) kaj de ties revuo, disvastiganto de Esperanto (precipe en gazetoj kiujn li redaktis), iniciatinto de la restarigo de la Esperanto-movado en Popola Ĉinio, kunfondinto kaj la unua prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo (1951-86), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1984); en 1991 aperis la ĉinlingva kolekto *Verkoj de Hujusz pri Esperanto*.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 130-132.

30. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Leopoldo Henrique Knoedt** (1921-1955-2000), brazila industriisto kaj esperantisto; Esperanto-instruisto, membro de la Akademio de Esperanto (1986-95); tradukinto de pluraj verkoj en Esperanton, i.a.: *Elektitaj Poemoj* de Castro Alves (1959), *La Luzidoj* de Camões (1980), *La Balado de Prizono Reding* de O. Wilde (1993), *Vivoj Sekaj* de G. Ramos (1997), *A Raça Menina* (portugaligo de *La Infana Raso* de W. Auld, 1992) k. a.; honora membro de UEA (1992).

31. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Nikolaj Ivanoviĉ Ĥoĥlov** (Хохлов, 1891-1905-1953), rusa ekonomikisto kaj esperantisto, konata en Esperanto ankaŭ kiel Nikolao Hohlov; sekretario de la lingva komisiono de SEU, gvidanto de la Esperanto-sekcio de la sovetunia amikeca societo VOKS, membro de la Lingva Komitato (1929-38); aŭtoro de la populara poemaro *La tajdo* (1928), tradukinto de pluraj beletraj, politikaj kaj fakaj verkoj.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 133-134.

Aleksander Korĵenkov



Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>

Lingvo



En la sekvaj paĝoj aperas la teksto de la prelego de Věra Barandovská-Frank, kiun ŝi prezentis en la 5a Interlingvistika Simpozio ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznań. Temas pri lingvofrankaĵo, iam vaste uzata, ekzemple, en Lecantenio.

Pri "lingua franca"

de Věra Barandovská-Frank



Resumo: La termino "lingua franca" (Esperante: lingvafrankao) kutime indikas perilon por interkomunikado inter diversaj kulturoj. Tio perfekte validas por la historie unua Lingua Franca del Levante (aŭ: de Mediteraneo), plej ofte karakterizata kiel piĝino, kiu tamen mire funkciis nekredinde longe. Ĝia unua funkcio estis buŝa interkompreniĝo inter italoj, hispanoj, portugaloj, francoj, araboj, turkoj, grekoj, judoj kaj alinacianoj, kiel lingvo de maristoj, komercistoj, piratoj, sklavoĵ, servistoj, vojaĝantoj, pastroj, soldatoj ktp., kiel atestas multaj personoj. Skribaj dokumentoj estas malmultaj kaj diversaj, kio supozigas ekziston de pluraj variaĵoj aŭ eĉ dialektoj. Ĝia bazo tamen estas sendube romana, tial la unua moderna specialisto pri ĝi estis la fama romanisto kaj "patro de kreolistiko" Hugo Schuchardt. Lia artikolo *Die Lingua Franca* (1909) restas baza dokumento, kiun liaj posteuloj uzis por evoluigi aron da diversaj teorioj pri la nomo, karaktero, tipo kaj evoluo de tiu belsona lingvo. Post la konkero de sia lasta grava centro, Alĝero, en 1830, ĝi pli kaj pli cedadis al la franca lingvo. Schuchardt mem ne plu trovis ĝin vivanta en Levantenio. Mi eliras el lia artikolo kaj klopodas kolekti interesajn teoriojn kaj faktojn pri la originala lingvafrankao.

1. Terminokonfuzo

La termino *lingua franca* estas hodiaŭ komprenata preskaŭ nur kiel sinonimo de interlingvo, t. e. lingvo uzata por interkompreniĝo de homoj kun reciproke nekompreneblaj denaskaj lingvoj. Tute normale oni asertas, ke la angla lingvo estas la plej disvastiĝinta lingvafrankao en la mondo, aliaj lingvafrankaoj estas ekzemple la araba, la mandarena ktp., eĉ Esperanto estas foje nomata tiel.

Komence, lingua franca (prononcata "franka"), langue franque, estis lingvo de romanigitaj frankoj, origine ĝermana tribo vivinta ĉe Rejno en la tempo de Romia Imperio. En la 5a jarcento la frankoj konkeris la iaman Romanan provincon Gaŭlion kaj fondis Frankan Imperion, kiu sub Karolo la Granda ampleksis grandan parton de Eŭropo. En 843 ĝi dividiĝis: la orienta parto restis germana (inkludante germanajn frankojn), sed la okcidenta gaŭlia parto, nun nomata Francio, konservis sian

Romanan lingvon (unu el la dialektoj de la vulgara latina lingvo). Tieaj reĝoj nomis sin “reĝoj de frankoj” ĝis la 13a jc.

Por ne konfuzi la lingvon de frankoj kun la piĝino “lingua franca”, oni uzis la precizigon “del Levante” aŭ “de Mediteraneo”. La vorto *Levante* (en Esperanto: Levantenio) venas de la latina absoluta ablativo “sole levante”, t. e. [ĉe/dum] leviĝanta suno, sinonimo por oriento. La regiono de Levantenio entenis ĉiujn landojn, kiuj troviĝis ĉirkaŭ Mediteraneo oriente de Italio, do Grekion, insulojn en la Egea maro, marbordojn de Turkio, Libano, Palestino, Sirio kaj Egipto. Tiu ĉi regiono spertis fortajn influojn de okcidenta kulturo kaj civilizo ĉefe dum la tempo de krucmilitoj ekde la 11a ĝis la 15a jarcentoj. La unuan krucmiliton organizis francoj, kiuj fondis en Levantenio graflandojn Edesso kaj Tripolo, princlandon Antioĥio kaj en 1099 la reĝlandon Jerusalemo, kies oficiala lingvo do iĝis la franca.

Pro historiaj kialoj ŝajnas esti konvinka la teorio, ke la francoj estis la unuaj eŭropanoj, kiujn araboj en Levantenio renkontis, tial ili nomis ĉiujn eŭropanojn “faranĝi” (frankoj), kaj la jam uzata kontaktlingvo “lisān-al-faranĝi” (lingvo de eŭropanoj) ricevis la nomon *Lingua Franca*, poste nomata ankaŭ “ferenĝhi”, “sabir” (laŭ la verbo “scii”) aŭ “petit mauresque” (eta maŭreca).

Schuchardt (1909:449) tamen rimarkigas, ke la unuaj eŭropanoj, kiuj estis komercantaj kun Levantenio jam pli frue, estis ne francoj, sed italoj el Ĝenovo kaj Venecio. Eŭropanoj aplikis la nomon lingua franca unue al la konkreta lingvo uzata en kontakto kun Levantenio, poste la termino ĝeneraliĝis kaj signifis “komerca kontaktlingvo” kun aludo al “porto franco”, t. e. (liber-)komerca haveno. La francoj, kiuj nomis la lingvon “la langue sabir”, diradis ke “elle jouait *franchise* dans les ports”, do ĝuste liberan komercon. Tial, klarigas Schuchardt, oni nomis la malajan lingvafrankao de Indonezio, la svahilan lingvafrankao de Orienta Afriko kaj la italan lingvafrankao de Adriatiko. Modernaj esploristoj venas kun pluaj teorioj, sed fine konkludas, ke la veran devenon de la termino oni ne plu povas malkovri kun certeco (ekzemple, Nolan 2015:101).

2. Historio

Same kiel la origino de la nomo, ankaŭ la historia komenco de lingvafrankao ne estas klara. Mediteraneo estis grava komerca centro jam en antikva tempo, kiam oni vaste uzis la latinan. Necesas mencii, ke la okcidentaj latinidaj lingvoj estis en la mezepoko ankoraŭ tre similaj kaj certe reciproke kompreneblaj. Krom la itala, la hispana, la franca kaj la portugala, al la kategorio de la grandaj kulturaj lingvoj apartenis la okcitana. Krome, la kataluna, la sicilia kaj pluraj malgrandaj latinidaj lingvoj estis parolataj ĉirkaŭ Mediteraneo. Tio pravigas nin supozi, ke iu praorigine latindevena lingvafrankao estis en tiu regiono uzata jam frue (komp. Corré 2005:3). Ĉar ĝi servis preskaŭ ekskluzive al praktika buŝa komunikado, ni ne povas prijuĝi ĝian aspekton. En la komercaj kaj aliaj kontaktoj estis krome envolvitaj araboj,


grekoj, turkoj, armenoj, judoj kaj aliaj nacioj, el kies lingvoj venis la piĝina subtavolo.

La unua rekonata specialisto pri lingua franca estis Hugo Schuchardt (1842-1927), eminenta romanisto kaj fondinto de kreolistiko. Laŭ lia monogeneza teorio, ĉiuj piĝinoj kaj sekve kreoloj originas de portugaleca pra-formo ekestinta dum la koloniigo de okcidenta Afriko, de kie maristoj pluportis ĝin tra la mondo. Lingua franca estas tamen nomata “la prapatrino” de piĝinoj. Lia difino estas jena:

“La lingvafrankao estas el latinida materialo konstruita perad-lingvo, kiu estis uzata en la mezepoko de romanoj kaj araboj, poste ankaŭ de turkoj, kaj ŝajnas esti delonge disvastiĝinta sur la tuta suda kaj orienta bordo de Mediteraneo. En la nuna tempo oni nenion plu scias pri ĝi en Levantenio, ĝi estas limigita al Berberio” (Schuchardt 1909: 441).

Berberio estis en la 16-19a jc. nomataj la landoj de berberoj ĉe nordafrika marbordo okcidente de Levantenio, do la sultanlando Maroko kaj osmanaj regentejoj Alĝerio, Tunizio kaj Tripolio/Libio. (La arabdevena termino *Magrebio* estas nun pli konata.) Loĝis tie ĉefe maŭroj (islamigitaj berberoj) kaj moriskoj (kristanigitaj islamanoj forpelitaj el Hispanio). Ili prosperis pro piratado, kaperado, elpremo de mono kaj pleje pro sklavkomerco. Sklavigitaj estis milionoj da kristanoj, forrabitaj precipe el Italio, Hispanio kaj Portugalio. Ekzemple, post la batalo ĉe Ksar-el-Kebir en 1578, en kiu Portugalio malvenkis, kaj la reĝo Sebastiano eĉ senspure malaperis, aperis tiom granda kvanto da sklavigitaj portugaliaj kaptitoj, ke ilia lingvo forte influis la lingvafrankaon de Alĝero. Tion diras, ekzemple, Pierre Dan (Dan 1646), franca pastro kiu veturis al Alĝero por elaĉeti kelkajn francojn kaptitajn de piratoj. Estas ankaŭ konate, ke metiistoj kaj artistoj scipovantaj paroli lingvafrankaon estis pli bone pagataj.

Diversaj atestantoj priskribas lingvafrankaon kiel *miksaĵon* de lingvoj hispana, itala, portugala, okcitana kaj franca, do pure latinidan lingvon, aliaj karakterizas ĝin kiel italan lingvon el Malto kun arabaj elementoj. Ĝi estis parolata en ĉiuj havenoj de Mediteraneo, uzata same en Konstantinopolo kiel en Gibraltaro, en Marsejlo kiel en Alĝero, Tripolo kaj Aleksandrio, en Levantenio kaj eĉ en oazoj de suda Alĝerio. Estas klare, ke ĝi ekzistis en lokaj variantoj, kiuj sin povis reciproke influ.




Hugo Schuchardt

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La sesa ero en la ciklo pri la rusaj romanoj de la 20a jarcento estas la romano *La kvieta Dono* de Miĥail Ŝoloĥov, kiu en 1965 iĝis Nobelpremiito pri literaturo pro “la arta potenco kaj kompleteco, kun kiuj li en sia eposo pri Dono esprimis la gravan historian periodon en la vivo de la Ruslanda popolo”.

La arta potenco kaj kompleteco

Unuafoje proponita kiel kandidato por la literatura Nobelpremio en la postmilita jaro 1948a, **Miĥail Aleksándroviĉ Ŝóloĥov** (Шóлохов, 1905-1984) ricevis ĝin nur en 1965 post la dek-unua kandidatigo, unu jaron post kiam Jean-Paul Sartre, laŭreatigita en 1964, malakceptis la premion, interalie, pro la obstina rifuzado de la svedaj akademianoj atribui ĝin al Ŝoloĥov.

La Nobelpremio estis donita pro “la arta potenco kaj kompleteco, kun kiuj li en sia eposo pri *Dono* esprimis la gravan historian periodon en la vivo de la Ruslanda popolo”. Ni aldonu: ke la rekono venis kvaronan jarcenton post la eldono de ĉi tiu eposo, kiun ni konas kiel *La kvietaj Dono* (ruse: *Тухи́й Дон*, angle: *And quiet flows the Don*).

Estas interese, ke la aŭtoro, kvankam naskita en kozaka regiono kaj kreskinta inter kozakoj, mem ne estis kozako, nek naskiĝis kiel Ŝoloĥov. Lia patrino Anastasija Ĉernikova laboris kiel servistino ĉe riĉa bienistino Popova, kiu edzinigis ŝin al filo de la ĉefvilaĝa atamano Kuznecov. Ŝi baldaŭ fuĝis de la atamanido kaj, ĉar tiu ne konsentis pri divorco, vivis ekstergeedze kun la nekozaka brutokomercisto, vendisto kaj diversmetiulo Aleksandr Ŝoloĥov; nur post la morto de Kuznecov en 1913 ili rajtis oficiale geedziĝi, kaj ilia filo Miĥail, naskita la 11an (Gregorie: la 24an) de majo 1905 en la vilaĝo Kruĵilin(skiĵ), en la subdistrikto de la kozaka ĉefvilaĝo Vjóŝenskaja (Вёшенская), ricevis la familinomon Ŝoloĥov.

Kial gravis la (ne)kozakeco? La Ruslandaj kozakaj viroj estis membroj de ne-regula armeo en limregionoj (pro la kresko de Ruslando tiuj povis iĝi internaj regionoj), kaj ankaŭ iliaj familianoj apartenis al la kozaka socia stato. Ĉiuj sanaj kozakoj ekde la infanaĝo estis pretigataj al la armea servo, kiu komenciĝis post la 19-jariĝo. Post trijara servado, la kozako revenis hejmen por du-tri jaroj, kaj poste reiris en la armeon, kaj tio povis okazi kvarfoje.

Krom la devoj estis ankaŭ privilegioj: la kozakoj ne pagis impostojn, senpage uzis la ŝtatajn agroj, ĝuis senpagajn medicinon kaj lernadon ktp, sed ili devis mem pagi siajn uniformon, sabron kaj ĉevalon. En la kozakaj regionoj tradicie estis pli da memregado ol en la “granda” Ruslando, sed estis ankaŭ forta (mem)disciplino.

Je la komenco de la romano (1912) en Ruslando estis iom pli ol tri milionoj da kozakoj. Ĉirkaŭ duono el ili (1,53 mln) loĝis en Regiono de Dona Armeo (Область Войска Донского). La regiono estis dividita je naŭ distriktoj (Vjoŝenskaja estis en Donecka distrikto), kies subdividoj estis subdistriktoj kun ĉefvilaĝoj (станции) kiel centroj.



Miĉjo Ŝoloĥov kun la gepatroj (1913)

Miĥail lernis en la lernejo de la kozaka vilaĝo Kargin(skaja), kie la gepatroj ekloĝis en 1910, poste en la gimnazioj de Bogučar kaj Vjoŝenskaja, sed li ne finis la lernadon, kiel 15-jarulo li mallonge laboris kiel alfabetigisto por plenaĝuloj, kaj post faka studado en Rostov-na-Donu iĝis proviantisto kaj impostisto. En aŭgusto 1922 Miĥail estis arestita, kaj revolucia tribunalo minacis mortkondamni lin pro lia ofica misagado (li reduktis impostojn al malriĉuloj), sed danke al falsado de la naskiĝ-atesto (la patro reduktis lian aĝon je du jaroj) li, kiel neplenaĝulo, evitis la ekzekuton kaj estis *konvencie* kondamnita al unujara restado en “korektejo por neplenaĝuloj”; reale li rajtis esti libera ĝis la unua delikto, kiun sekvus validiĝo de la verdikto.



Fine de 1922 Miĥail ekloĝis en Moskvo ĉe amiko, poste en komunloĝejo, ŝanĝis kelkajn profesiojn, lernis aŭtodid-akte kaj pro sia emo al verkado (li ekverkis kiel gimnaziano) aliĝis al la literatura grupo “Juna gvardio” kaj partoprenis en akra polemiko inter tiamaj literaturaj koterioj. Jam en 1923 gazetoj publikigis kelkajn liajn felietonojn, kaj fine de 1924 en *Juna Leninano* aperis la unua beletra rakonto *Nevuso* de la 19-jara aŭtoro. Sekvis pliaj. En 1926 aperis du liaj novelaroj (*Donaj rakontoj* kun 1925 kiel eldonjaro, kaj *Lazura stepo*), kaj unu jaron poste la novelaro *Pri Kolĉak, urtiko kaj cetero*. Ilin bonege akceptis la legantaro kaj kritiko.

Intertempe li revenis al Donlando, edziĝis kun la bazlerneja instruistino Maria Gromoslavskaja, filino de eksa atamano de Bukanovskaja, kaj en 1926 definitive ekloĝis en Vjoŝenskaja, vivtenante sin per ĵurnalismo kaj verkado. Ĉi tie li kreis plejparton de siaj verkoj, inkluzive de la romanoj *La kvieta Dono* (1928-40), *Kulturado de neplugita stepo* (*Поднятая целина*: 1932, 1959) kaj *Ili batalis por la Patrujo* (*Они сражались за Родину*: 1943, 1969).

Sian ĉefverkon pri la Dona kozakaro li ekverkis en 1925 per epizodo el la jaro 1917a (poste ĝi aperos en la kvara parto de la romano), sed li rompis la laboron kaj nur aŭtune 1926 rekomencis ĝin per eventoj de la 1912a jaro.

Post unu jaro la unua libro (partoj 1, 2, 3) estis preta, kaj Ŝoloĥov iris al Moskvo por trovi eldonanton. Tio montriĝis malfacila, kaj nur danke al la persisto de A. Serafimoviĉ ĝi aperis en la unuaj kvar numeroj por 1928 de la revuo *Oktobro* (*Октябрь*), kiun Serafimoviĉ redaktis, kaj intertempe Ŝoloĥov finverkis la duan libron (partoj 4, 5), aperintan en la sama revuo de majo ĝis oktobro. Sekvis pluraj libroformaj eldonoj, kiuj alportis al la aŭtoro enorman popularecon kaj ... kontraŭulojn inter la ekstreme maldekstraj anoj de RAPP (Ruslanda Asocio de Proletaj Verkistoj), kiuj denunciis lin pri plagiato, ĉar junulo ne povus aŭtori tiel elstaran verkon. La denuncio estis esplorita kaj dementita de speciala komisiono, al kiu Ŝoloĥov disponigis la manuskriptojn, malnetaĵojn kaj planojn de ĉiuj siaj verkoj. La kalumnio ŝajnis forgesita.

En la tri komencaj numeroj de *Oktobro* por 1929 ekaperis la tria libro, kiun konsistigis la sesa parto, sed pro la rezisto de la proletverkistoj la publikigado estis

haltigita. RAPP en sia plenkunsido en septembro 1929 stampis lin ne proleta, sed kampara verkisto, kulpigis lin pri neglekto de la klasbatalo, simpatio kun kontraŭrevoluciaj protagonistoj, paleco de la “ruĝaj herooj” kaj alvokis *reeduki* lin. La novaj redaktoroj de *Oktobro* (K. Fedin, poste F. Panfjorov) postulis, ke li politike korektu la daŭrigon, negativigu la kontraŭkomunistan kozakan ribelon en Vjoŝenskaja (1919), faru la ĉefan protagoniston Grigorij Meleĥov ruĝulo ktp, sed Ŝoloĥov ne akceptis tion kaj memstare traktis kun malgravaj gazetoj pri publikigo de kelkaj pliaj ĉapitroj.

Ne helpis eĉ Gorĵkij, kiu rekomendis al *Oktobro* publikigi la trian libron senŝanĝe, kaj nur interveno de Stalin, kun kiu Ŝoloĥov renkontiĝis en la apudmoskva vilao de Gorĵkij, trarompis la digon: en 1932 la tria libro estis finpublikigita en *Oktobro*, sed la redakcio draste redaktis la tekston kaj forigis plurajn paĝojn pri kruelaĵoj de la ruĝarmeanoj. Kiel aparta eldono la tria libro aperis en 1933, kaj en la sama jaro la tri partoj estis kune eldonitaj kun forta cenzurado de la unuaj du libroj. La cenzurado koncernis ne nur ideologion; sen konsento de la aŭtoro estis forigitaj aŭ mildigitaj sakraĵoj kaj tro naturalismaj scenoj.

Post la tria libro Ŝoloĥov verkis sian “politike lojalan” romanon pri la kolektivigo de kamparanoj *La kulturado de stepo* kaj poste daŭrigis la laboron pri la lasta, kvara libro de *Dono* (partoj 7 kaj 8). La verkado daŭris longe, kaj la sepa parto aperis en *La Nova Mondo* (*Новый мир*) en 1937-38. La situacio en Sovetunio malboniĝis, komenciĝis amasaj arestoj. Eksciinte, ke la Rostova fako de NKVD planas akuzi lin kiel gvidanton de kvazaŭ preparata kontraŭsoveta kozaka ribelo, Ŝoloĥov, sen atendi areston, rapidis Moskven kaj petis renkontiĝon kun Stalin. Post longa diskutado, kiun partoprenis aliaj partigvidantoj kaj la ĝenerala komisaro pri ŝtata sekureco N. Jeĵov, la agado de Ŝoloĥov estis aprobita, kaj Stalin denove subtenis lin, resuminte: “Por la granda rusa verkisto Ŝoloĥov devas esti kreitaj bonaj laborkondiĉoj”.

Reveninte hejmen, Ŝoloĥov dum unu jaro verkis la okan parton, kiu aperis komence de 1940 en *La Nova Mondo*. La tuta romano estis presita en 1940 en kvar apartaj libroj kaj printempe 1941 kiel unuvoluma luksa eldono. Jam en 1930 aperis filmo laŭ la du komencaj libroj, sekvis pliaj filmoj, spektakloj, opero, centoj da reeldonoj kaj tradukoj. Sed meze de la 1970aj jaroj emerĝis la malnova akuzo pri plagiato.

Ne plu temis pri nekonata kozaka oficiro, sed pri Fjodor Krjukov (Крюков, 1870-1920), filo de kozaka atamano, verkisto kaj politikisto, membro de la unua Ruslanda parlamento “Duma” (1906), partopreninto de la Ruslanda Interna Milito je la kontraŭrevolucia flanko. Li verkis rakontojn kaj skizojn pri kozakoj, kiuj aperis en liaj tri novelaroj (1905, 1907, 1914), kaj laŭdire estis verkanta grandan romanon pri Donaj kozakoj (laŭ aliaj, pri la ribelo sub la gvido de la kozako Stepan “Stenĵka” Razin en 1670-71), kies tekston oni ne trovis post lia morto pro tifo komence de 1920.

Irina Medvedeva-Tomaŝevskaja (1903-1973), sovetunia literaturistino, laŭ sugestoj de A. Solĵenicyn dediĉis siajn lastajn vivojarojn al serĉado de informoj pri la aŭtoreco de *La kvinta Donn*. Ŝia pria libro aperis unu jaron post ŝia morto en Parizo ĉe la kontraŭsoveta eldonejo *YMCA-Press* sub la pseŭdonimo D. kaj kun prefaco



Ŝoloĥov sur balkono de sia domo en Vjoŝenskaja (1936). En 1942 la hitleranoj, kiuj ne sukcesis transiri Donon, bombe detruis la domon. Pereis la patrino de la verkisto, kiu tiam estis en la armeo.

de Solĵenicyn, kiu komence de 1974 estis forsendita el Sovetunio. Solĵenicyn en sia prefaco nomis la aŭtoron de la romano “senkompara geniulo”, kaj subtenis la hipotezon de D. pri la aŭtoreco de Krjukov. En 1975 ĉe la sama eldonejo aperis la libro *Kiu verkis “La Kvietan Donon”* de la disidento Roj Medvedev.

Preskaŭ ĉiuj argumentoj estas tre facile refuteblaj – kaj delonge refutitaj, ekzemple, la trojuneco de Ŝoloĥov (Puŝkin estis samaĝa kun li, kiam aperis la unua ĉapitro de *Eŭgeno Onegin*, nomata “Enciklopedio de la rusa vivo”), nesufiĉa klero (liaj samtempuloj Bunin, Gorĵkij, Jesenin kaj Majakovskij estis ne pli kleraj ol Ŝoloĥov), simileco de la priskriboj de la Donlanda naturo kaj kozaka vivo ĉe Krjukov kaj Ŝoloĥov (ili priskribis la samajn lokojn en la sama regiono kaj uzis la saman kozakan lingvaĵon; precipe strangas la akuzoj pri la simileco de la priskribo de la ĉevala jungilaro kaj de la kozakaj uniformoj kaj sabroj – ili ja ne povus esti malsimilaj) ktp.

La aŭtorecon de Ŝoloĥov (kaj la neaŭtorecon de Krjukov!) konfirmis ankaŭ sciencaj esploroj, unue, de la interuniversitata laborgrupo sub la gvido de la norvega slavisto Geir Kjetsaa, farita en la Upsala universitato jam en 1975. Similajn rezultojn poste donis aliaj komputilaj komparoj de fruaj tekstoj de Ŝoloĥov kaj Krjukov kun la *Dono* je la niveloj leksika, sintaksa kaj stila. Tiun rezulton donis ankaŭ la plej freŝdata (2019) komputila esplorado de Boris Oreĥov kaj Natalja Velikanova, uzintaj la precizan metodon “Delta”, kreitan de John Burrows.

La neaŭtorecon de Krjukov pravas ankaŭ tio, ke en la verko de Ŝoloĥov estas multegaj faktoj, kiujn Krjukov ne povis scii, ĉar la aŭtoro de la romano ricevis ilin

rekte de la prototipo de Grigorij Meleĥov – kozako Ĥarlampij Jermakov (li aperas en la romano ankaŭ kiel reala persono!). La armeaj sortoj de Meleĥov kaj Jermakov estas ne nur similaj, sed preskaŭ identaj: en la lokoj de la servado en la armeoj Imperia, Ruĝa kaj en la kontraŭbolŝevista kozaka ribelarmeo, en iliaj armeaj rangoj, distingoj, vundoj ktp. En la plej fruaj ĉapitroj, verkitaj en 1925, la ĉefa protagonisto havas la nomon Abram Jermakov, sed Ŝoloĥov devis ŝanĝi ĝin al Meleĥov, ĉar en 1927 Jermakov estis arestita kaj pafekzekutita.

Fine, la publikigitaj verkoj de Krjukov estas meznivelaj kaj tute ne donas la senton, ke ilin verkis “senkompara geniulo”.

Ŝajnis, ke la diskuto devus finiĝi, tamen unu el la argumentoj ŝajnis serioza, nome: la manuskripto de la du komencaj libroj ne konserviĝis. Ŝoloĥov ja ricevis ĝin en Moskvo post ĝia ekzamenado en 1929, sed, ne havante sian propran loĝejon en la ĉefurbo, li lasis ĝin ĉe sia amiko Vasilij Kudaŝov, kiu, laŭ lia vidvino Matilda Ĉebanova, ironte al la fronto kiel arma ĵurnalisto kunprenis la manuskripton por finlegi ĝin. Post tri monatoj Kudaŝov pereis (poste evidentiĝis, ke li estis militkaptivo kaj mortis en nazia koncentrejo), kaj la manuskripto ne estis retrovebla.

Ĉebanova mensogis, ŝi konservis la manuskripton por vendi ĝin post la morto de Ŝoloĥov, kiu malgraŭ siaj militaj kontuzoj kaj malsanoj forpasis nur la 21an de februaro 1984. Post lia morto ŝi adresis sin al la ĵurnalisto Lev Kolodnyj, kiu anoncis la sensacian trovon, sed kaŝis ŝian nomon. Fine, post la morto de Ĉebanova kaj de ŝia filino, kiu reprenis de ŝi la manuskripton, nur en 1999 la manuskripto estis aĉetita de la nevino de Ĉebanova, kaj la laŭleĝaj heredantoj de Ŝoloĥov – liaj gefiloj Maria, Stetlana kaj Miĥail – havante la rajton repreni la havaĵon de sia patro (kaj vendi ĝin) – honeste rezignis pri sia rajto, kaj la manuskripto, aĉetita de la Ruslanda Scienca Akademio, estis detale studita kaj faksimile eldonita en la 2006a jaro.

Nun ĉiu deziranto povas legi ne nur la presitan tekston, sed, se temas pri la unua parto, ankaŭ la unuan kaj duan malnetajojn kaj la netan manuskripton – ĉiuj estas manskribitaj de Ŝoloĥov.

La 1700-paĝa romanego, en kiu rolas preskaŭ 700 personoj, inter kiuj pli ol triono havas realajn prototipojn aŭ estas historie aŭtentaj personoj, prezentas defion por tradukantoj pro abundo de dialekta kozaka lingvaĵo, kies devio de la norma rusa lingvo ne estas adekvate transdonebla alilingve. Post pluraj malsukcesaj provoj, mi kapitulacis kaj sekvis la ekzemplon de la anglaj tradukintoj (Temas pri la konciza traduko de la unuaj du libroj, farita de Stephen Garry en 1934, kaj pri lia teksto redaktita/reverkita kaj kompletigita de Robert Daglish en 1960.), kiuj sisteme tradukis la dialektaĵojn per ordinara angla lingvo.

Sed mi esperas, ke malgraŭ tio, kelkaj el la komencaj ĉapitroj de *La kvieta Dono*, en kiuj ĝermas la amo de Grigorij kaj Aksinja, donas iom da imago pri unu el la ĉefverkoj de la rusa literaturo. Mi estos feliĉa, se iu(j) el vi, gustuminte ĉi kelkajn fragmentojn en Esperanto, sentos deziron (re)legi la originalon.

Aleksander Korĵenkov



La kvieta Dono

de Mihail Ŝoloĥov

La unua libro

La unua parto

I

La Meleĥova bieno situas rande de l' vilaĝo. La pordo de la porbruta korto malfermiĝas norden al Dono. Kruta dekliva vojo kondukas inter muskokovritaj kalkaj ŝtonegoj je ok klaftojn malsupren al la bordo, sur kiu kuŝas multegaj perlamotaj konkvoj, griza malrekta strio el ŝtonetoj ĉirkaŭkisitaj de ondoj, kaj poste, kvazaŭ bolanta ŝtalblua ondetaro, fluegas Dono. Oriente, post la salika plektobarilo de la draŝkorto estas la Hetmana ĉefvojo¹ ĉirkaŭata de grizaj absintoj kaj brunaj plantagoj, tretitaj de ĉevalaj hufoj, eta kapelo ĉe vojforko, kaj post ĝi stepo vualita de tremanta nebuleto. Sude videblas kalkeca montokruco. Okcidenten kondukas strato, kiu traas la placon kaj direktiĝas al la inunda herbejo.

Post la antaŭlasta turka kampanjo² al la vilaĝo revenis la kozako Prokofij Meleĥov. El Turkujo li venigis edzinon – etan virinon, envolvitan en ŝalon. Ŝi kaŝis sian vizaĝon, malofte vidigante siajn sopirajn sovaĝajn okulojn. La silka ŝalo odoris je foraj nekonataj aromoj, ĝiaj ĉielarkaj arabeskoj nutris la envion de la virinoj. La kaptita turkino evitis la familion de Prokofij, kaj la maljuna familiestro Meleĥov baldaŭ apartigis la filon kaj, ne forgesante la ofendon, li ĝis sia morto ne vizitis la filan bienon.

Prokofij baldaŭ transloĝiĝis: ĉarpentistoj konstruis la domon, li mem aranĝis baritajn kortojn por brutoj, kaj ĉe aŭtuniĝo li venigis sian kurbiĝeman fremdlandan edzinon al la nova hejmo. Li iris kun ŝi tra la vilaĝo post la longa ŝarĝoĉaro sur kiu estis ilia havaĵo. Ĉiuj vilaĝanoj, de beboj ĝis olduloj, estis sur la strato. Kozakoj diskrete ridis tra la barboj, inoj krie interparolis, hordo da nelavitaj kozakidoj moke blekis al la dorso de Prokofij, sed li nehaste, kvazaŭ laŭ freŝplugita sulko, iris en sia nebutonita uniforma jako, tenante en sia nigra mano la gracilan maneton de la edzino. Li

fiere tenis sian kapon kun blankeca kozaka hartufo³, sed sub liaj zigomoj movetiĝis muskolaj ŝvelaĵetoj, kaj ŝvito aperis inter liaj kutime ŝtone senmovaj brovoj.

De tiam oni malofte vidis lin en la vilaĝo, li eĉ ne venis sur la placon por la kozakaj kunvenoj kaj loĝis ermitece en sia vilaĝoranda domo ĉe Dono. En la vilaĝo cirkulis strangaj onidiroj pri li. Knaboj, kiuj paŝtis bovidojn ekster la vilaĝo, rakontis, ke ili vidis, kiel Prokofij ĉe la sunsubiro sur siaj manoj portis ŝin foren al Tataara tumulto, sidigis ŝin sur la tumulosupron per la dorso al la ŝtono, truita de la tempo, sidiĝis apud ŝi, kaj ili longe sidis rigardante al la stepo. Ĉi tiel ili rigardadis ĝis la krepuskofino, poste Prokofij envolvis la edzinon en sian mantelon kaj reportis ŝin hejmen sur siaj manoj. En la vilaĝo oni tiel verve serĉadis klarigon de tiuj bizarajoj, ke pro la klaĉoj la kozakinoj ne havis tempon por la rutina senpedikigado. Pri la edzino de Prokofij oni parolis malsame: iuj asertis, ke ŝi estas senkompare belega, la aliaj – male. Ĉio klariĝis, kiam la plej kuraĝa kozakino, soldatedzino⁴ Maŭra, venis al Prokofij, kvazaŭ por fermentaĵo. Dum Prokofij malsupris en la kelon por la fermentaĵo, Maŭra sukcesis vidi, ke Prokofij predis tute malbelegan turkinon.

Baldaŭ Maŭra, kies vizaĝo ruĝiĝis kaj la kaptuko glitis flanken, vortpafis surstrate al la virina amaso:

– Kion bonan, karulinoj, li trovis en ŝi? Se ŝi bonus virine, jes, sed ŝi... Nek pugo, nek ventro, sed nura honto. Niaj knabinoj pli belas, sed ne povas edziniĝi. Ŝian vespan talion oni povas disŝiri. Ŝiaj okuloj nigras kaj grandegas; ŝi okulpikas kiel satano, Dio pardonu min. Probable, ŝi jam longe gravedas, je Dio.

– Ĉu gravedas? – la inoj miregis.

– Mi ja ne infanas, mi mem patrinis tri idojn.

– Kaj la vizaĝo kias?

– Ĉu la vizaĝo? Flava. La okuloj senbrilaj. Ja ne dolĉas la vivo en fremdlando.

Kaj ankoraŭ, karaj inoj, ŝi surhavas ... Prokofijan pantalonon.

– Ĉu-u? – ili ĥore aĥis en timo.

– Mi mem vidis – lia pantalone, nur sen strioj⁵. Verŝajne ŝi surmetis la ĉiutagan. Sur ŝi estas longa ĉemizo, kaj sub la ĉemizo estas pantalone enmetita en la ŝtrumpojn. Kiam mi ekvidis tion, mi tute frostiĝis...

En la vilaĝo oni ekflustris, ke la edzino de Prokofij estas sorĉistino. La bofilino de la Astaĥoj (la plej proksimaj najbaroj de Prokofij) ĵuris, ke je la dua tago de Pentekosto, ŝi vidis kiel ĉe la mateniĝo la Prokofija edzino, sentuka kaj senŝua, melkis bovinon en ilia korto. Post tio la bovinaj mamoj sekiĝis kaj etiĝis ĝis infanpugno, lakto ekmankis, kaj baldaŭ la bovino mortis.

En tiu jaro brutoj mortadis amase. Sur la sabla terlango ĉe kiu estis bruta trinkejo, ĉiutage aperis kadavroj de bovinoj kaj bovidoj. Ankaŭ ĉevaloj komencis morti. Malgrandiĝis la ĉevalaroj en la vilaĝa paŝtejo. Kaj sur la stratoj kaj stratetoj de la vilaĝo aŭdiĝis makabra klaĉo.

La kozakoj okazigis vilaĝan kunvenon kaj venis al Prokofij.

La mastro venis sur la sojlon kaj riverencis.

– Por kio vi bonvolas veni, karaj aĝuloj?

La homamaso mute proksimiĝis.

Fine iu ebrieta maljunulo kriis la unua:

– Trenu ĉi tien vian sorĉistinon! Ni aranĝos la juĝon!..

Prokofij impetis en la domon, sed en la enirejo⁶ oni haltigis lin. Alta kanonisto kun la strata kromnomo Apogilo frapadis la kapon de Prokofij, admonante lin:

– Ne bruu, ne bruu, ĉesu jam!.. Vin ni ne tuŝos, sed vian inon ni enbatos en la teron. Prefere ni mortigu ŝin ol la tuta vilaĝo mortu sen la brutoj. Sed vi ne bruu, alie mi detruos la muron per via kapo!

– Tiru ŝin, la putinon, en la korton! – oni grakis ĉe la sojlo.

Samregimentano de Prokofij volvis sur sian manon la harojn de l' turkino, per la alia mano fermis ŝian kriantan buŝon, kurante trenis ŝin tra la enirejo kaj ĵetis ŝin al la piedoj de la amaso. Akuta krio traboris la muĝantajn voĉojn.

Prokofij disĵetis ses kozakojn kaj, enkurinte en la domon, kaptis sian sabron⁷ de la muro. Puŝante la apudulojn, la kozakoj fuĝis el la enirejo. Svingante super sia kapo la brilantan kaj fajfantan sabron, Prokofij elkuris laŭ la ŝtuparo. La amaso ŝanceliĝis kaj disŝutiĝis tra la korto.

Ĉe la grenejo Prokofij kuratingis la peze kurantan kanoniston kaj de malantaŭe dissabris lin de la liva ŝultro ĝis la zono. La kozakoj, eltirantaj palisojn el la barilo, dise forkuris tra la draŝejo en la stepon.

Post duona horo la kozakoj retrovis la kuraĝon kaj proksimiĝis al la bieno. Du kurbiĝintaj skoltoj venis en la enirejon. Sur la kuireja sojlo, nenature retroklininte la kapon, kuŝis en sangoflakoj la edzino de Prokofij; en la fendo inter ŝiaj martirece vidigitaj dentoj movetiĝis ŝia mordita lango. La kapo de Prokofij skuiĝis, lia rigardo senmovis; li estis volvanta en ŝafpeltaĵon pepantan buleton – la antaŭtempe naskiĝintan bebon.

* * *

La edzino de Prokofij mortis vespere de tiu tago. La frunaskitan infanon kompatas ties avino, la patrino de Prokofij, kaj komencis zorgi pri li.

Oni ĉirkaŭis lin per vaporumitaj branoj, nutris lin per ĉevalina lakto kaj post unu monato, certiĝinte, ke ĉi tiu malhelhaŭta turkeca knabeto estas vivipova, portis lin al preĝejo kaj baptis lin. Omaĝe al la avo li estis nomita Pantelej. Post dek du jaroj da bagnado Prokofij revenis. Lia pritondita kaj kelkloke griziĝinta rufa barbo kaj la kutimaj rusaj vestaĵoj, aspektigis lin fremdulo malsimila al la kozako. Li adoptis la filon kaj reprenis la mastrumadon de sia bieno.

Pantelej en la junaĝo estis nigrece malhela kaj tre petolema. Laŭ siaj vizaĝo kaj svelta korpo li similis la patrinon. Prokofij edzigis lin kun filino de najbara kozako.

Ekde tiu tempo la turka sango miksiĝis kun la kozaka. Kaj tiel aperis en la vilaĝo la hoknazaj, sovaĝe belaj kozakoj Meleĥovoj, kromnomataj Turkoj.

Post la morto de sia patro Pantelej plene dediĉis sin al la mastrumado: li faris novan tegmenton por la loĝdomo, aldonis al la bieno duonhektaran antaŭe nekulturatan terenon, konstruis novajn tenejojn kaj grenejon sub lada tegmento. La tegmentisto laŭ lia mendo kreis el la restaĵoj du ladajn kokojn kaj fiksis ilin sur la greneja tegmento. Ilia senzorga aspekto gajigis la Meleĥovan korton kaj donis al ĝi aspekton de memkontento kaj prospero.

La rampantaj jaroj fortikigis lin kiel arbotrunkon: Pantelej Prokofjeviĉ larĝiĝis, iom kurbiĝis, sed plu aspektis kiel lerta maljunulo. Li estis sek-osta, lama (en la junaĝo lia maldekstra kruro estis rompita ĉe rajdkonkurso en Imperiestra armea konkurso), arĝenta krescenta orelringo pendis en lia maldekstra orelo, liaj korakaj barbo kaj haroj ne griziĝis ĝis la maljuniĝo; en kolero li iĝis furioza kaj, verŝajne, pro tio antaŭtempe maljuniĝis lia iam bela korpulenta edzino, kies vizaĝon nun komplete kovris sulka araneaĵo.

Lia pliaĝa, jam edziĝinta filo Petro similis sian patrinon, nealta, hoknaza, brunokula, kun tritikoloraj konvolvulaj haroj. Sed la juna filo Grigorij dekomence estis kiel la patro: je duona kapo pli alta ol Petro, kiu estis je ses jaroj pli aĝa, same kiel lia patro li havis longan akcipitran nazon, el iomete oblikvaj palpebrofendoj rigardis bluaj migdaloj de la brulantaj okuloj, la angulecaj zigomoj estis tegitaj per bruna, ruĝeca haŭto. Grigorij, same kiel la patro, estis iom kurbiĝema, eĉ en la ridetoj ambaŭ havis ion beste sovaĝan.

La Meleĥovan familion kompletigis Dunjaŝka⁸, longbraka, grandokula adoleskantino – la favoratino de la patro – kaj la Petra edzino Darja kun ilia bebo.

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Junecaj revoj

de Ewa Grochowska



Anksio pro la renkontiĝo igis nian unuan brakumon hezitema. Ni venis en nian naskiĝurbon el malsamaj landoj kaj rigardadis nin reciproke kun nekaŝebla scivol-emo. Embarasataj, ni atentis pri niaj tasoĵoj de kafo, serĉante taŭgajn vortojn.

– Barbara, vi tute ne ŝanĝiĝis, – li komencis mallaŭte kun tenera brileto en liaj avelkoloraj okuloj.

– Ankaŭ vi ne ŝanĝiĝis; nur ... viaj manoj, ili ne estas la ŝamaj.

Li observis ilin surprize, kvazaŭ mi sciigus al li malbonan novaĵon.

– Nu, ne miru, ĉiutage mi uzas skulptmartelon kaj gravurilon.

– Tamen plaĉas al mi viaj manoj. Nun, ili ŝajnas kapablaj subteni iun, ili estas pli fortaj ol antaŭ jardekoj.

Li aspektis konsternita. Ĉu eblas? Ĉu li ankoraŭ estas timema? Kiam ni studis belartojn en mezlernejo, ni jam estis tre malsamaj. Male al mi, spontana, impeta knabino, Davido estis sindetenema, trankvila, malbabilema. Li ne serĉis amikindon, sed finfine li ne rezistis al miaj delogaj rigardoj. Lernanto kapabla, li ŝatis rivali kun aliaj. Dank' al sia facileco en la ĉizado li trudis sin kiel la plej bona el ĉiuj. Li sukcese trapasis ekzamenon en Akademio de Belartoj, dum mi, posedante nenium apartan talenton, studis arthistorion. Ni plu renkontiĝis. Nia adoleska rilato iĝis pli kaj pli serioza. Konvinkitaj pri la forto de nia amo, ni deziris konstrui komunan estontecon. Bedaŭrinde, la Granda Historio vanigis niajn revojn.

En 1968, la komunista registaro ekigis antisemitan kampanjon. Ĝi kulpigis civitanojn juddevenajn pri manipulado de studentoj. Fakte, multaj gejunuloj ribelis kontraŭ la tiama registaro sendepende de sia origino. Ili postulis la rajton sinesprimi libere, la nuligon de la cenzuro. La laboristoj manifestaciis kontraŭ la studentoj kriante: «La studentoj lernu, ne enmiksiĝu en la politikon!» Estrara agmaniero kreis grandan konfuzon ĉe la popolo. En la jaroj 1968-1970, preskaŭ dudek mil homoj elmigris. Ili sentis sin poloj, tamen multaj ĵurnalistoj, instruistoj aŭ tiuj, edukad-profesioj ne plu povis praktiki. La gepatroj de Davido decidis, ke li devas foriri alilanden.

Dum ni kafumis, Davido parolis pri ekspozicio de siaj skulptaĵoj en Kulturpalaco

kaj mi pri seminario, kies temo estis artoterapio. Mi ankaŭ sciigis lin pri mia zorgo trovi inspiron por artikolo publikigota antaŭ la monato fino. Li proponis, ke ni promenu. Sen konsulti unu la alian, ni direktis nin al Parko Lazienki. La aŭtuno jam koloris foliojn. Inter brunore vestitaj arboj, ŝopeno sidanta sub plorsaliko, ŝajnis pli grandioza ol kutime. Pli malproksime ŝtonaj, abomenbuŝaj satirusoj memorigis al ni la vojon al Palaco sur Akvo. Ju pli ni marŝis, des pli la tempo retropaŝis. Jen la maljuna kaŝtano, atestanto de niaj unuaj kisoj. Jen la sciuro, kiu trakuras la vojon, fiere balancante sian rufan voston. De tempo al tempo anstataŭ iri en la lernejon, ni vagadi ĉi-tie. Davido sekvis tiujn bestetojn kun Kodako enmane. La felĉaj momentoj de pasintaj jaroj kortuŝis min profunde. Mi pensis ankaŭ pri la fotografaĵo de sciuro. Dorsflanke li skribis: «Vi estas la plej hela folio en mia vivo».

Tiuj vivaj memoroj proksimigis nin; ni decidis revidi nin vespere. La lokon ni ne bezonis elekti; ni iros en tiun restoracion en la Malnova Urbo, la plej ŝatatan de ĉiuj studentoj en la fino de la jaroj sesdekaj. La dekoracio de la loko ŝanĝiĝis. La nova proprietulo deziranta altiri turistojn, alkroĉis kontraŭ la murojn ĉion, kio prezentas polan folkloron: lignajn statuetojn de Jesuo «ĉagrenita», popolajn artpaperajn eltranĉaĵojn, afiŝojn de bunte vestitaj, dancantaj paroj. Malhela lumo kaj melodioj el nia junaĝo faciligis konfidencojn. Ni rakontis unu al la alia niajn travivaĵojn. Davido dufoje eksedziĝis. Li vivas sola. Lia unua filino loĝas en Novjorko. La profesia pasio sufiĉe kompensas la mankon de sentoj. Li longe laboris en Kararo¹. Nun, en sia ateliero apud Torino li prilaboras bakitan argilon. Mi parolis pri mia vivo en Parizo, pri mia eksedziniĝo, kiu okazis antaŭ kvar jaroj, pri miaj ĝemeloj jam studentoj kaj pri mia laboro en franca artrevuo. Dum nia parolado, unu sola penso turmentis min. Finfine mi kuraĝis demandi.

– Diru, Davido, kial vi neniam skribis al mi post via foriro?

– Kial mi ne skribis?! Vi ŝercas, Barbara! Mi sendis unu leteron ĉiusemajne, sed vi ne respondis. Do mi kredis, ke nia rilato estas finita por vi, ke vi ne plu amas min. Mi ne komprenas. Mi ricevis nur unu bildkarton sen via adreso.

Mi silentis. Mi pensis pri mia unua, dolora ama elreviĝo, pro kiu mi ploregis plurajn monatojn. La sola persono, kiu aspektis kontenta malgraŭ mia malespero, estis mia patro. Li neniam ŝatis Davidon kaj ne kaŝis sian ĝojon, kiam mia koramiko malaperis el mia vivo. Ĉu li kapablas fari tion? Ĉu li timis la leterojn el Israelo? Ĉu li timis, ke ankaŭ mi foriros kaj li perdos sian ununuran filinon? Mia patro jam forpasis, do mi neniam scios la kialon, sed nun por mi ĉio estas klara: li detruis la leterojn. Mi dividis tiun suspekton kun Davido.


Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Du ringoj

de Paulo Sergio Viana



Li estis viro kun anguleca vizaĝo. Kiam mi vidis lin unuafoje, li estis sidanta sur ligna seĝo, rekta kaj senkomforta, kiu faris lin eĉ pli kurba. Kuprokolora senbrila haŭto, premita de interne per elstarantaj ostoj. Ŝparema pri gestoj, kiam li movis siajn brakojn, ili aspektis kiel apenaŭ artikitaj, kvazaŭ baldaŭ forsaltontaj. La okuloj rigardadis, etaj, palpebrumantaj, kaj nenion diris, nenion montris pri tiu nepenetrebla menso; ili nur rigardadis, rekte kaj fikse. Tamen li rigardis min, kiam mi ekstaris antaŭ li kaj riskis:

– Bonan tagon!

Li grumblis ion. Nur. Kaj plu rigardis. Rigardis kvazaŭ gvate.

– Kion signifas tiuj du ringoj?

Efektive, ligitaj al malmultekosta kolĉeno, ĉirkaŭ la kolo, la viro havis du rustiĝintajn ringojn. Tio vekis mian atenton. Poste mi rigardis liajn manojn, kiuj estis krudaj, kun mallongaj, dikaj fingroj, plenaj de nodoj. Oni povis facile vidi, ke tiuj ringoj ne povus kuŝi ĉirkaŭ iu ajn el tiuj fingroj; ili estis etaj, kiel fingroringoj de infanoj. Ringoj por maldikaj fingroj.

– Neniu demandas, homoj ne emas ekscii. Vi demandis, mi klarigos. Kiel vi vidas, ili estas etaj ringoj, por delikataj fingroj. Neniu persono surportas parajn ringojn ligitajn al malnova ĉeno. Oni emas demandi. Mi rakontos, se vi paciencas. La unua ringo longe restis sur la kvara fingro de Malva. Nigra Malva, tre nigra. Mi ekkonis Malvan en fiŝfoiro, ŝi havis tranĉilon en la mano, kaj mi vidis, ke ŝi frapetas la ringon sur la tenilon de la tranĉilo. Ŝi tranĉadis skvamojn kaj marviandon tre lerte. Al la fiŝoj plaĉis, kiam Malva tranĉis ilin. Oni povis vidi je ŝia mieno esprimon de ĝuo, kiam ŝi dispecigis tiujn brilantajn, glatajn estulojn. Tiu klingo, en la internaĵo de homo, dancus feste. Makabran dancon. Malva estis ĵaluzema, vidva, kaj oni diris en la foiro, ke Malva tranĉis sian viron pro ĵaluzo. La korpo neniam aperis, oni diris, ke ĝi fariĝis nutraĵo de fiŝoj, rande de la kajo. Kaj ke pro granda ĵaluzo, Malva plu tranĉadis lian karnon pere de la refarita karno de fiŝoj. Ni decidis kunvivi geedze, kaj Malva neniam flankenlasis sian misteron, eĉ okaze de geedza intimeco. Mi neniam diris al ŝi, ke mi amas ŝin, ankaŭ ne ŝi al mi. Mi rigardis ŝin per ĉi tiuj miaj du etaj okuloj malfidemaj; ŝi ridetis, ridetadis, kaj mi neniam sciis, kion esprimas tiu rideto. Pasis tempo, unu pluvan tagon, nuboplenan kaj malvarman, ŝi vokis min kaj subite diris:

“Kiam mi foriros, vi prenu ĉi tiun ringon kaj pendigu ĝin sur vin per kolĉeno. Por via bono.”

Ĉu tio estis peto, ĉu minaco, kio? Estus vane peti klarigon, sed la forton de ŝia determino mi konstatis en la sekva tago: Malva mortinta sur la lito, kvazaŭ dormanta, preskaŭ ridetanta. Mi rigardis, mi forprenis la ringon de sur la kvara fingro, etan ringon, sen-signifan, kaj mi pendigis ĝin per ĉi tiu kolĉeno Ĉi tie ĝi restadas. Mi enterigis Malvan en nuboplena vesperiĝo, la taglumo malaperis pli frue ol kutime.

Kaj la ringo ĉi tie kuŝas, sur ĉi tiu brusto malmola kaj seka, ĝis mia lasta tago en la mondo. Tamen mi ekkonis Dolores okaze de promenoj, kiujn mi faris ĉirkaŭ la foirejo. Ŝi laboris en vendejo de sorĉaĵoj. Mi venis por rigardi la statuojn, la negrojn kun blanka hararo, la sanktulinon blue vestitan, iujn koboldojn, kaj iujn miraklajn herbojn. Mi suferis pro iuj haŭtulceroj, Dolores proponis kuracadon. Ŝi receptis banojn, kiuj efikis eminente, mi tute puriĝis.

Komence, Dolores rigardis min iom strange, kvazaŭ ŝi esplorus ion. Ŝi faris ŝajne nai-vajn demandojn, mi rimarkis, ke ŝi observas min. Ĝis ŝi venis al la esenca punkto, same kiel okazis al vi.

“Kio estas tiu ringo, sur tiu kolĉeno?”

Mi ĉion rakontis; laŭ ŝia mieno, ŝi komprenis. Sed silentis. Mi atendis ian komenton, sed ĝi ne sonis. Nur rideto. Tre ĉarma, cetere. Tio devigis min reveni al la vendejo de sorĉaĵoj. De la oblikva interparolo al amindumo sufiĉis unu sola paŝo. Alia paŝo estis kundividi la malriĉan domon. Sed Dolores faris unu solan postulon, kiu sonis per ŝia milda, dolĉa voĉo, kaj eĉ ne ŝajnis postulo:

“La ringon oni devas prizorgi. Via forpasinta edzino certe estis tre ĵaluzema, ĉu? Tia virino, kiu ŝatas tranĉilojn?”

Mi konfirmis, mirante pri ŝia scio. Tiam ŝi finklarigis:

“Fingroringo en tia maniero, sur rustiĝinta kolĉeno, malhelpas, ke oni denove edziĝu. Kaj se oni forĵetas ĝin, des pli malbone. Unu fojon uzita, ĝi lasas la malicon de ĵaluzo algluita. Ekzistas nur unu solvo, se oni emas denove edziĝi: oni parigu alian ringon samspecan, ambaŭ kune pendu, por ĉiam, tiel ke unu puŝu la alian. Ringo de nova amo. Tie ĵaluzo trovas aŭdacon, kaj unu skrapigiĝas kontraŭ la alia, kaj ambaŭ eluziĝas. Se vi volas, mi donos al vi unu mian ringon. Ŝi ridetis tiel ĉarme, ke mi akceptis, mi kredis. Nenion mi perdis, nenion.

Kaj ni geedziĝis kiel malriĉuloj, laŭ intenco kaj karesemo. Dum multaj jaroj, Dolores ĉiam dolĉis, ĉiam ridetis. Mi rajtas diri, ke mi estis feliĉa, se ĉi tiu vorto ne estas troa. Kiam ŝi mortis, mi tre malĝojiĝis, kaj mi ne plu trovis similan rideton, nek voĉon, nek saĝecon kompareblan. Ĝis mia lasta tago mi restos ĉi tie, rigardanta la mondon per miaj etaj okuloj kaj kun ŝi, eĉ se nevidebla.

Jen tio estas mia historio, kaj la historio pri ĉi tiuj du ringoj. Al mi plaĉis via pacienco, sinjoro.

Mi atendis iom pli, eble venos unu plia vorto, eble konkludo. Nenio. La viro rigardis ĉirkaŭ si, svage.

Memorflokoj

de Laure Patas d'Illiers



La neĝo grizas palkolore, malsaneme sub la ĉiela malhelgrizo. Tie supre percept-eblas kelkaj steloj. Sude iom pli helas la ĉielo, ĝis haloo sukcenkolora ĉirkaŭ la suna blanka disko. En intensa frosto senmovas la aero. Neniu venta blovo puŝas neĝan pulvoron tra la vasta ebenaĵo. La naturo fiksiĝas dum momento eterneca. En la oktobrofina torporo, la norvega kamparo silentas, endormiĝanta por travintrin. Eĉ tagmezo ĝin ne vigligas.

Arve sidas inter la aliaj, en la rondo de samklasanoj. Iom fore kaj dise, kuŝas la motorsledo, per kiuj ili veturis ĉi tien. Ĉiu kunportis sakon plenan je manĝaĵo. La sakoj estis senzorge ĵetitaj unu sur la alia, proksime de ilia rondo. La amaso de sakoj ŝajnas monteto, kies facila ombro apenaŭ malheligas la neĝon.

Ĉiuj dek kvin lernejoj ĉeestas. Neniu maltrafus la piknikon, ĉiujare okazantan post la lerneja rekomenco. Tiu ĉi aŭtuna pikniko estas ilia lasta, same kiel la venonta lerneja jaro estos ilia lasta. La venontan aŭtunon ĉiuj disaj sekvos sian propran vojon. La plejmulto restos en la vilaĝo kaj komencos metilernadon. Kelkaj foriros al la urbo por lerni profesion en altlernejo. Nur Arve forlasos Norvegion por studi muzikon en Berlino, helpe de stipendio eŭropa.

Ili sidas runde sur la neĝkrusto, efike ŝirmitaj per vintraj vestaĵoj, kies kolorojn malakrigas la avara lumo. En anorakoj ŝvelintaj, sub dikaj ĉapo, similas knaboj kaj knabinoj. Ili rigardas unu la aliajn, iom faldante la okulojn super larĝaj ridetoj. Foras la vilaĝo, agrablas sen plenkreskulo nek zorgo. Ili ĵetas unu al la aliaj saketojn de ĉipsoj kaj krakmanĝas. Ene de la rondo la malplenaj disŝiritaj sakoj ellasas erojn. Metala botelo da brando ĉirkaŭiras de buŝo al buŝo. Kiam ĝi malplenas, la granda Sven stariĝas kaj iras plenigi ĝin el la bareleto stivita al lia motorsledo.

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Persefona seksuma en infero

Kiel la sveda akademio trovas la laŭreaton por la Nobel-premio pri literaturo? Tio estas profunda sekreto. Ni nur scias, ke nun eksteraj spertuloj konsilas la akademianojn, sed kiu proponas kaj kial ili ĝuste elektas la specifan kandidaton estas profunde kaŝita malantaŭ la muroj de la akademio. En 2020 ili trovis poetinon el Usono kun “neintermiksebla poezia voĉo”. Ili ankaŭ konstatis, ke per ŝia verkado “individua ekzisto fariĝas universala empirio”.

Estas tamen strange, ke ili neintermikseblan voĉon denove trovis en la anglalingva literaturo (tri jarojn post Ishiguro), kaj ili denove premias usonan poeton (kvar jarojn post Dylan). Tio ne konformas al mia kompreno de tutmonda literaturo. Aŭ alivorte: kial la akademianoj trovas nur voĉojn, kiuj similas al ili kaj ilia tradicio? Ili premias blankulan okcidentan komprenon de literaturo, kiun Glück – tamen iom kritike – reprezentas:

“Estas konate, ke ni estas nacio de rifuĝintaj arestitoj, pli junaj filoj, persekutitaj minoritatoj kaj oportunistoj. Tiu famo estas loke kaj rasiste limigita: estas la mito de la blanka Usono de si mem. Tute evidente tio nek priskribas la spertojn de la originaj loĝantoj de Usono nek de la nigraj amerikanoj” (el *Usona Originaleco*).

Glück rikoltis jam preskaŭ ĉiujn gravajn premiojn pri literaturo en sia hejmlando. Do almenaŭ tie ŝi estas konata nomo. Mi ne scias, ĉu ŝiaj verkoj estas legataj ankaŭ ekster akademia medio.

Kio estas tiu Louise Elisabeth Glück, kiu naskiĝis en 1943 kaj publikigis 12 poemarojn inter 1968 kaj 2014? Feliĉe, jam ekzistas kritikaj analizoj de ŝia verkaro kaj tiel ni povas proksimiĝi al ŝia verkado.

Ŝia vivo malhavas sensaciajn eventojn. Dum la infanaĝo ŝiaj gepatroj rakontis al ŝi la rakontojn de la greka kaj romia mitologioj kaj tiujn pri figuroj de la historio, ekzemple, Johana de Arko. Dum adolesko ŝi suferis de anoreksio. Pro tio Glück komencis psikanalizan terapion. Speciale gravaj por venki la malsanon estis por ŝi la poeziaj metiejoj, kie ŝi, laŭ ŝi mem, “lernis pensi sendepende”. Pro tio ŝi dediĉis sian unuan poezian volumon “al mia instruisto” aŭ “al mia instruistino” – la angla “to my teacher” povas esti ambaŭ.

Tiu unua *Unuenaskito* (Firstborn) aperis en 1968. Glück enkondukas ŝin kiel melankolia poetino. Regas kvazaŭ morna etoso, seniluziigo. Eĉ la pejzaĝo estas malsana: “krokusoj sterniĝas kiel kancero” (en *Paska Tempo*). Post la unuenaskito Glück havis la sindronom de “blanka paĝo”, sed post kiam ŝi mem komencis instrui poezion, ŝi denove ekverkis. En ŝia dua libro *La Domo sur la Marĉo* (The House on Marshland), eldonita en 1975 unu el la temoj estas patrineco, kio reflektas, ke ŝi naskis filon en 1971.



Ankaŭ *Descedanta figuro* (Descending Figure, 1980) enhavas poemojn pri perdo kaj morto. La kolekto estas nomita laŭ ŝia triparta poemo pri mortintaj infanoj. Unu kritikisto eĉ konkludis, ke eble ŝi tute ne ŝatas infanojn. La dua parto de la poemo *Descendanta Figuro* temas pri pentraĵo de malsana infano:

La malsana infano

—*Rijksmuseum*

Eta infano

estas malsana, estis maldormanta.

Estas vintro, post noktomez

en Antverpeno. Super ligna kesto

la steloj brilas.

Kaj la infano

ripozas en la brakoj de sia patrino.

La patrino ne dormas,

ŝi rigardas

fikse al la brila muzeo.

Printempe la infano mortos.

Tiam estos malĝuste, malĝuste

teni ŝin—

Lasu ŝin sola,

sen memoro, kiam la aliaj maldormas

teruritaj, skrapantaj la sombrajn farbojn

de siaj vizaĝoj.

La sekva kolekto *La Triumfo de Aĥilo* (The Triumph of Achilles, 1985) enhavas poemon, kiu estas fama inter inistoj. Ĝi aperis en multaj antologioj, kaj tie ni legas interalie:

Mi malamas ilin.

*Mi malamas ilin samkiel mi malamas seksumadon, la langon de la viro
sigelanta mian buŝon.*

Mi finas la foliumadon de la verkaro de Glück. Jen kaj jen mi rimarkas novajn komprenojn de mitoj. Tiel la titolo de tiu alproksimiĝo estas citaĵo. Sed mi trovas ankaŭ liniojn, kiuj simple signalas kiĉon:

pasie alkroĉita al la vivanta arbo, mia korpo

eĉ bukilita en la fenditan trunkon, preskaŭ en paco, en vespera pluvo

preskaŭ kapabla senti

sukon ŝaŭmanta kaj leviĝanta

Eble la akademio denove faris politikan decidon. Eble post kvar jaroj ili volis honori voĉon de “la alia Usono”. Almenaŭ Glück estas bonvena kontrasto al la senĉesa fluo de malamo, supraĵoj, fiagitado kaj abomenaj mensogoj, kiuj ankoraŭ ĝis la 20a de januaro 2021 ŝpucos el la Blanka Domo.

Wolfgang Kirschstein

Memorinda paĝo de la historio de la hispanlingva literaturo: la modernismo

de Miguel Fernández



Unu el la plej gravaj movadoj en la historio de la hispana literaturo estis, sendube, la tiel nomata modernismo. Tiu interkontinenta hispanlingva beletra fenomeno, ĉefe poezia, ekis ĉe la fino de la deknaŭa jarcento kaj vivis ĝis, proksimume, la duono de la dua jardeko de la pasinta jarcento, sed ĝiaj eĥoj pluis trans la unuaj literaturaj avangardoj kaj atingis ĝis la unuaj epokoj de la poetoj de la avangardisma t. n. Generacio de 1927: Federico García Lorca, Vicente Aleixandre, Luis Cernuda k. a.

En 1898 Hispanio perdis la lastajn restaĵojn – ĉefe Kubon, Filipinojn kaj Porto-Rikon – de la iama imperio tiel vasta kaj disa, ke ĝi “ne konis sunsubirojn”. Imperio, kie malsato estis la konstanta havaĵo de la simpla popolo. Ondo da pesimismo invadas la hispanan vivon. La burĝaro, tamen, laŭe al sia gvidlinio, flankklasis afliktojn de la animo kaj iras rekte al sia afero: reorganiziĝo kaj orientiĝo almerkaten. La intelektuloj plejparte serĉas la spiriton de tio nomata Hispanio. Multaj el ili trovas ĝin en Kastilio, en ties sobreco, en ties pejzaĝo humila sed plena de poeziaj elvokoj... Kaj esploras kaj diagnozas la naciajn malsanojn. Kaj pledas por regenerado etika, politika kaj socia. Temas pri la tiel nomata Generacio de 1898. Literature konsistigas ĝin, baze, Pío Baroja, Ramiro de Maeztu, Azorín kaj Miguel de Unamuno. Poste pliaj gravaj verkistoj aliĝas al ĉi skolo.

Sed aliaj junaj beletristoj preteras serĉi la esencon de la patrio. Ili volas vivi la vivon. Ilin logas la freŝaj aeraj eksterlandaj, ĉefe francaj. Definitive liberiĝinte el la metropolo, Hispan-Ameriko, reage, rigardas al Francio sur la kultura tereno. Kaj importas kaj rekreas la literaturajn uzojn tiulandajn. La novaj verkad- kaj viv-stilo rezultantaj el tio nomatas modernismo. Baldaŭ ĉi tiu transiras Atlantikon per la persono de sia granda korifeo, la nikaragva poeto Rubén Darío, alnomata “patro de la modernismo” kaj “princo de la kastilingva beletra”, vera Kaloĉajo de la tiutempa hispanlingva poezio. Kaj la modernismo fortege enradikiĝas en Hispanio ĝis, proksimume, 1916, la jaro, kiam forpasas Darío kaj la junaj bardoj komencas trati la vojon al la ultraismo kaj kreismo, avangardaj movadoj de la dudekaj jaroj, antaŭaĵoj de la surrealismo.

Tiel la modernismon, kiel la literaturan movadon nomatan Generacio de 1898, startigis vento de nekonformismo kaj disidenteco, kun intensa antiburĝa emfazo, kontraŭ la tiama beletro prozeca, bombasta kaj vakua. Teknike, la modernismo konsistas en sintezo de la francaj skoloj simbolisma kaj parnasa. La modernistoj zorgis antaŭ ĉio pri la arto. Ilia maĵora dio, Verlano. Ilia korifeo, Rubén Darío. Iliaj eksteraj identosignoj, pipoj, fulardoj, longaj distaŭzitaj haroj, senĝeneco eskvizita kaj provoka kaj dumparola ŝato al la uzo de francismoj. Indiferentaj al socio, kiun ili taksis materialisma kaj griza, ili alstrebis la belon, ĉion raran, ekzotan, rafinitan, paganan, legendan, kosmopolitan. Kaj signis sian kontestadon per bohemiaj vivoformoj, turnante la dorson, kun defia pozo, al disdegnata realo. Eksteraj al la gravaj sociaj problemoj tiutempaj, la modernismaj poemoj plenas de mitologiaj etosoj, de dioj, nimfoj kaj satirusoj, faŭnoj kaj centaŭroj. De grafoj kaj princinoj. De Pierotoj kaj Kolombinaj. De pentrindaj pagodoj, grandiozaj kasteloj kaj versajleskaj salonoj. De parfumriĉaj ĝardenoj kun statuoj de efebecaj Merkuroj kaj kun cignoj, multaj cignoj, la bestoj adorataj de la modernistoj. De legendaj palacoj kun mil objektoj el eburo kaj perloj kaj gemoj... Percepteblas ankaŭ faceto intimisma, la preferata de la hispanaj modernistoj, kun du registroj: unu vitalisma kaj sens-ama; alia melankoliema, karakterizata de la gusto al ĉio aŭtuna, krepuska, dekadenca.

Rilate al la ritmoj, ili faris veran revolucion, importante versojn ĝis tiam apenaŭ uzatajn en la hispana sed laŭajn al la franca gusto, kiel estas p.e. la naŭsilabo. Aliflanke, multaj el ili praktikis versofaradon krom silabnombra, ankaŭ piednombran, parenca al la klasika greka kaj identan kun tiu nomata "propre esperanta" en *Parnasa gvidlibro*. Ekzemple, en sia poemo *Salutación del optimista* [Saluto de optimisto] Ruben Darío uzis daktilajn versojn. Plie, modernistoj ŝatis la dekduzilabon, la aleksandron, la sonetojn surbaze de aleksandroj... Ĉio ĉi donis al la modernisma poezio apartan bunton.

Sed, spite al – kaj transe de – ĉi abundo da sugesti-celaj ornamoj, tiaj antiburĝaj burĝoj, kiuj, tamen, serĉis la aplaŭdojn de la burĝaro, tiaj elituloj spirite aristokratcaj, elegantaj kaj eskvizitaj ĝis ridindo, radike renovigis la hispanan poezian lingvaĵon. Ili esploris la koloron kaj la muzikon de la vortoj, kreis multajn neologismojn – jes, karaj, ne-o-lo-gis-mojn! – kaj virtuoze entreprenis la ekspluatadon de tropoj, sensaj ekzaltiĝoj, simboloj...

Sed poiome multaj el la modernistoj ŝanĝiĝas. Poiome la kondiĉoj, en kiuj vivas la popolo, la ĉielklama ekspluatado, al kiu estas submetataj la laboristoj, la ĉiunivela stinka korupto de la hispana monarkia reĝimo... altiras iliajn plumojn kaj ilian nekonformismon al denuncado de tiuj maljustaĵoj. Pro natura evoluo, multaj el ili venas al la zorgoj de la anoj de la Generacio de 1898 kaj donas al la literaturo maĵorajn ĉefverkojn. Tiele, la genia Valle-Inclán¹ kaj la poetoj super poetoj Antonio Machado kaj Juan Ramón Jiménez² (Nobelpremiito pri Literaturo en 1956), kiuj komence trinkis el la fontoj de Rubén Darío kaj elstaris kiel modernistoj, fine enviciĝis inter la engaĝiĝintaj "naŭdekokaanoj" kaj tiutendare produktis majstraĵojn.

Rubén Darío (1867-1916), pseŭdonimo de Félix Rubén García Sarmiento, estis nikaragva poeto, ĵurnalisto kaj diplomato. Kiel junulo, li adoptis progreseman sintenon rilate al la problemoj de Ameriko kaj vojaĝis en Ĉilion kaj Argentinon, kie li konatiĝis kun la novaj poeziaj tendencoj kaj, pere de ili, kun la franca literaturo. Sian unuan grandan sukceson kiel poeto li atingis tre juna, en la aĝo de 21 jaroj, pere de sia poemaro *Azul* [Bluo(a)]. Li venis Hispanien por la unua fojo en 1892. Kiam li revenis, sep jarojn poste, li estis jam agnoskita kiel vera idolo. Ekde 1900, li, kiel diplomato, vivis en Parizo kaj ree en Madrido kaj vojaĝis en Eŭropon kaj Amerikon. Li vivis la vivon intense, preteratentante ekscesojn, kiuj ruinigis lian sanon kaj portis lin en la morton, kiam li aĝis nur 49 jarojn.

Rubén Darío rigardatas la poeto, kiu plej grande kaj daŭre influis la hispanlingvan poezion en la dudeka jarcento. El la abundaj produktoj de lia plumo – poemoj, artikoloj, noveloj, biografiaj skizoj de artistoj, impresoj pri homoj kaj eventoj ktp – elstarigindas lia poezia registro kaj, ene de ĝi, tri poemaroj, kiuj markas la kulminojn de tri epokoj en lia poeta evoluo: la menciita *Azul*, *Prosas profanas* [Profanaj prozaĵoj] kaj *Cantos de vida y esperanza* [Kantoj pri vivo kaj espero].

Por ilustru la plej karakterizajn trajtojn de la Rubén'a ateliero, mi elektis kaj esperantigis la poemon *Era un aire suave...* el *Prosas profanas*. Temas pri tre rafinita galanta sceno disvolviĝanta en nedifita epoko kaj el kiu eliras harmonio, eleganto, eskvizito, frivolo, sensamo... karakterizaj atributoj de la modernismo. Ĉi poemo, trairita de profunda monduma lirikismo, enhavas, kiel multaj el la Darío-poemoj, anekdoton: Eŭlalia, gaja markizino, rifuzas la amproponojn de du korteganoj kaj havas amajn rilatojn kun unu el siaj servistoj.

En la poemo, elstaras du sensaj efektoj: priskriboj de la pejzaĝo, de la vestoj, de la statuoj, de la trajtoj (vidaj efektoj); kaj aludoj al rido kaj muziko (aŭdaj efektoj). Temas do pri bildoj.

Rimarkindas ankaŭ rimedoj metaforaj: *Harmoni'*, *feino*, *rimis la flugerojn*, nome sonis muziko, ideo, kiu ripetiĝas en *Perlis el orkestro plej magiaj notoj*. Same rimarkindas la aludoj – *sagaro... zono... ŝpinbastono* – al la ĉarmoj kaj allogpovo de Eŭlalia. Ĉe *Fajne birdo-blekas ŝia rid' sen fino / kun la harmonio de pian-sonato* la markizino ridas muzike, kun la sono de piano aŭ de birdotrilo.

Elstaras, ne nur pro sia rigard-altira aspekto, sed ankaŭ kiel plej simbola elemento de la modernismo, la bildo de cigno, multfoje trovebla en la Darío'a poezio.

Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Baza Literatura Krestomatio / Kompilis kaj redaktis Vilmos Benczik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Russ Williams; Antaŭparolo de Aleksander Korĵenkov; Enkonduko de Vilmos Benczik; Biografioj de Vilmos Benczik, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. – 4a eldono, kompletigita. – Kalinin-grado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2019. – 368 p.

La lernado de nia literaturo kaj la alproprigo de nia kulturo pasas kutime tra la kursoj (nun grandparte retaj), al kiuj aldoniĝas la vivado dum la kunvenoj, kongresoj aŭ retaj blogoj aŭ babilejoj. Sed ĉar estas malfacile difini bazon en komunumo ne posedanta ŝtate organizitan lernoplanon, sin sekvas, de tempo al tempo, listoj de verkoj, kiujn la plej aktivaj instruistoj konsideras esencaj por ĉiuj, kaj kiuj iel homogenigus la komunan bazan konon. Forte unueciga estis la *Fundamenta krestomatio* (1903); kompreneble sekvis en la daŭro de la jardekoj diversaj tekstoj, inter kiuj specife intencataj kiel homogenigaj estis la *Esperanta antologio* (1955, 2-a eld. 1984) de Auld, kiu rilatis nur al la poezio, kaj *Trezoro* (1989), de R. Rossetti kaj H. Vatré, pri la novelarto.

Auld starigis bazan legoliston de la originala literaturo en 1988, kun ĝisdatigo kaj pliampleksigo en 1997 (<http://esperanto.net/literaturo/bazleg.html>). La prozaj verkoj estas tridek du, la poeziaj dudek sep. Ĉi tiuj listoj estas ankoraŭ konsiderataj kiel la bazaj, kvankam la kritiko de la lastaj dudek jaroj havus pli ol unu rezervon pri kelkaj verkoj tro alte taksataj. Nu, normale, kriterioj pri kompara graveco ŝanĝiĝas laŭ la jaroj kaj la generacioj, sed legado de pli ol kvindeko da libroj estas ja stimulinda, tamen malfacile konceptebla kiel baza kono, ankaŭ pro la ne ĉiam facila atingeblo de kelkaj tekstoj. Necesas io multe pli sinteza.

En 1979 aperis en Budapeŝto la unua volumo de *Krestomatio de Esperanta Literatura* kaj *Baza Literatura Krestomatio* (BLK). La unua verko, kies du postaj volumoj aperis en 1981 kaj 1982, estis kompilita de István Szerdahelyi por la studentoj de la Esperanto-fako de la universitato Eötvös Loránd, kaj la 500 ekzempleroj, perfekte adekvataj al la medio universitata, restis limigitaj al ĝi.

Male iĝis multe pli populara BLK, kompilita de Vilmos Benczik akompane al la historia parto de la *Gvidlibro por supera ekzameno* kaj konsiderinda kiel “literatura minimumo en la esperantista kultura komunumo”. La unua eldono disvendis siajn 3500 ekzemplerojn en du jaroj; dua kaj tria eldonoj, presitaj en 3000 kaj 2320 ekzempleroj respektive, ĝis 1986, konfirmis la valoron de ĉi tiu kompilaĵo. Evidentiĝas unu interesa principo: ne temas ja nur pri la originala Esperanto-literaturo, kiel ĉe la listoj de Auld, sed enestas 13 eroj tradukitaj, en la konsidero, establita ankaŭ en la *Historio de la Esperanta Literatura* (2015), ke ankaŭ tradukoj apartenas al la Esperanta literaturo, tamen nur se ili estas vere lingvofondaj, ne ja ĉar la originalo estis grava en sia literaturo.

BLK restis senmova ĝis 2018, kiam ĝisdatigo montriĝis nepra: tro multe kreskis


la literaturo dum la lasta generacio; do, akorde kun Benczik, tripersona teamo el I. Ertl, A. Korĵenkov kaj R. Williams kompilis *Postrikolton* el 23 novaj aŭtoroj, aldonotan al la senŝanĝa eldono de 1986. Oni povus sin demandi, ĉu kun la eroj de tiu eldono, okupantaj 227 paĝojn en la nova, la plusaj 104 paĝoj de la *Postrikolto* formas plenan ekvilibron, aŭ ĉu estis pli oportune remuldi la tuton, eventuale forpreni ion, kio en la nova komplekso aspektus malpli grava kompare kun la novaj enprenitoj. Certe ja oni povus, sed la ŝanĝoj estus infinitezimaj. La nuna eldono (2019), ĉe *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio, havas sian personecon kaj sekvas siajn principojn. Ne ĉiu akceptus ĉiujn; laŭ mi, ekzemple, pridubinda estas la principo, ke se iu verkisto estis jam en la antaŭa eldono, li ne troviĝas en la *Postrikolto*, malgraŭ, ke li bele, eĉ tre pli bele, verkis ankaŭ freŝdate; tio laŭ mi okazas, ekzemple, al Nervi, Ragnarsson, de Kock. Oni povus objeti, ke el la pli ol deko da romanoj verkitaj de István Nemere, aŭ el sama nombro de Trevor Steele, nur po unu fragmento aperas (kvar- kaj ses-paĝa, respektive), dum la versoj de Camacho ĝuas ok paĝojn (Mao nur tri), sed prozo fatale suferas en tiaspecaj antologioj, ĉar poeziaĵoj estas sence kaj arte kompletaj en si mem, dum prozaj fragmentoj altirus al plia legado; komplemente, iu bedaŭros, ke Bronŝtejn aperas nek per siaj kanzonoj, nek per sia romano, kaj ke troviĝas neniu teatraĵverkisto, kiaj Gubbins, Mallia, Silber.

Sed ne decas plendi: la verko estas kohera, bone konstruita, ampleksa kaj ĝiaj 368 paĝoj estas legindaj ĉiuj, kaj, grandparte, relegindaj plurfoje; ĝi tute adekvate prezentas nian literaturon kaj ekde nun ĝi estu la referenca fonto kiel komuna bazo. Kompletigas la libron tre utilaj sintezaj biografioj de la 81 verkistoj enprenitaj. Ĝi tre taŭgas, se ne centprocente, ekzemple post elimino de la tradukitaj eroj, kiel modelo por nacilingvaj tradukoj (simila poezia antologio en la itala estas en preparo). Trista fina rimarko: la eldonnombro deklarita estas 500; komparo kun la pasintjarcentaj eldonoj ne estas entuziasmiga.

Carlo Minnaja

(Ĉi tiu recenzo unue aperis en la revuo *Esperanto*, 2020, №10.)

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO



Tuta biblioteko en unu volumo
Nova eldono korektita kaj ampleksigita
199 verkoj aŭ fragmentoj de 82 aŭtoroj
Kuneldonis *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio
368 paĝoj
Prezo: 27 eŭroj
Aĉetebla ĉe UEA kaj aliaj libroservoj

Ĉiujare samloke...

Belarta rikolto 2020: Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. – Novjorko: Mondial, 2020. – 146 p.

Pasas jaroj, multo okazas en la mondo (ĉi-jare tiu damnita kronviruso ĉion fuŝis) kaj en la vivo de ĉiu homo... Sed unu afero en mia vivo ekde 2013 restas nepra, kutima: ĉiujare recenzi la vican volumon de la *Belarta rikolto*. Ĉi-foje la volumo estas ampleksa: 146 paĝoj (nur en 2017 estis iom pli: 152 paĝoj, en aliaj jaroj signife malpli), kun tradicia skemo de la enhavo: “Poezio”, “Prozo”, “Mikronovelo”, “Mologoj kaj skeĉo”, “Eseo” kaj “Raporto de la prezidanto”.

Poezia parto ĉi-jare vere altnivelas. La ciklo de Nicolino Rossi *Mia kvaropo admirinda* (1a premio) pri kvar elstaraj italaj poetoj ekde la 16a jc ĝis nun. Legantoj povas trasantan spiritan kaj espereblan eĉ deziri legi iliajn verkojn. La nova sonetkrono de Evgenij Georgiev *Ek sor* (2a premio), nun pri nia sunsistemo. Mikso de astronomio kun mitologio, tamen vere arta. La 3an premion ricevis tri verkoj: Serĝo Sir', konata kiel humoristo, verkis klasikforman soneton kun moka ironia enhavo: “Pri-kronvirusa kroniko”. Temas ne tiom pri la viruso, kiom pri niaj samtempuloj ne-disigeblaj de siaj saĝtelefonoj... Ŝajne telefonoj jam pli saĝas ol ties mastroj. Tiberio Madonna (multe verkanta ankaŭ en Ido) prezentis la poemaĵon *La renkonto kun la trompo* – modernisman, t. e. sen rimoj, sen ritmo kaj (preskaŭ) sen senco, ĝuste kiel ŝatas niaj iberaj kolegoj, gurdantaj ke rimoj kaj ritmo en poezio definitive eksmodas. Mi plurfoje provis klarigi, ke ruslingve tia “modernismo” estis moda antaŭ cent jaroj, kaj eksmodiĝis antaŭ kvindek; sed la *ekstreme dura* poeto ja aŭdas kaj admiras nur sin mem... tamen pardonu, mi iom deflankiĝis. Finas la poezian parton vere moderna kaj profundpensa poemo de Jesper Lykke Jacobsen *La nigra dio* kun subtilaj aludoj kaj tute nova rimedo – kradvortoj (tio, kio angle nomiĝas “hashtag”), vere sprita kaj aktuala, eble la plej atentinda inter ĉiuj ĉi-jare premiitaj poemoj. Mi bedaŭras, ke ĝi ricevis nur la 3an premion.

Prozo. La 1an premion pro la novelo *Finjo* ricevis mia samlandano Vladimir Opletajev. Mi konas lin dum jardekoj kiel bonegan instruiston, sed eĉ ne sciis, ke li talentas ankaŭ literature. Nur infanaj rememoroj – sed rakontitaj arte kaj sprite.



Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

En la 38a almanako Ulrich Lins kaj Probal Daŝgupto nekrologe eseas pri Victor Sadler, konsiderata kiel unu el la plej originalaj voĉoj de la Esperanta poezio, sed li estis ankaŭ grava funkciulo ĉe UEA (redaktoro, direktoro de la Centra Oficejo). Nekrologo pri Hu Guozhu, unu el la ĉefaj tradukistoj de la ĉina literaturo en Esperanton enhavas du liajn poeziajn tradukojn.


Originala prozo venas de tri aŭtoroj: Sten Johansson (*Entombigo*), Laure Patas d'Illiers (*La respondo estas ne, ĉu?*) kaj Probal Daŝgupto (*La frikta vojo*).

Traduke kontribuas Jorge Camacho, prezentante al la Esperanta publiko la novelon *Sunplena apokalipsa mateno* de la hispana sciencfikciliteratura kritikisto Santiago L. Moreno kaj tri rakontojn (*Cent dudek ŝtupoj*, *Homa korioida gonadotropino*, *Ritaroj kontraŭ sendormecon*) de la madrida verkistino kaj bibliotekistino Mayte Blasco.

Ikaromenipo aŭ la Supernubulo estas verko de Lukiano, kiu verkis en la malnovgreka, ĝin esperantigis Gerrit Berveling, kiu jam konigis en BA du aliajn verkojn de Lukiano. Miguel Fernández enkonduke prezentas ĉi-numere plian portugalajn poeton, nome, Fernando Namora, kies ses poemojn li tradukis por la poeziŝatantoj. Kun naŭ poemoj de la usonano Jericho Brown ni konatiĝas danke al la traduko de Suso Moinhos.

Aŭdante la nomon Izrael Lejzerowicz, oni tuj pensas pri lia satiraĵo *El la "Verda Biblio"*, verkita en 1935 kaj repopulariĝinta pro la kelkaj reeldonoj. Ulrich Lins esploras la vivon kaj agadon de ĉi tiu juda ĵurnalisto kaj komercisto, difinante lin radikala esperantisto. Usui Hiroyuki esploras la poezion de William Auld rilate al la temoj "postmorta mondo", "Dio/Satano" kaj "drinkado".

Reziste al la koronavirusa pandemio estas direktita la artikolo *Semo de matenruĝoj* de Miguel Fernández, kiu tuŝas, interalie, elkatakombigon de la Esperanta kulturo, kion li mem elstare faris per partopreno en migraj surstrataj deklamadoj Esperantaj kaj hispanlingvaj. Ĝin sekvas elhispanigita antaŭparolo de Armando Silles McLaney al *Semilla de arrebol*, la unua hispanlingva poemaro de la Esperanta poeto Miguel Fernández.



Ĝi estas demonstra versio de la 120-paĝa decembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA KUNULARO DE L' RINGO



J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA DU TUREGOJ

Tolkien en Esperanto



J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA REVENO DE LA REĜO



J.R.R. Tolkien

LA HOBITO

**aŭ
tien kaj reen**

Mendu ĉe via libroservo.

ESPERANTO ESTAS PLI OL LA MOVADO

De 40 jaroj **MONATO** raportas ne pri Esperanto sed en Esperanto pri la plej diversaj flankoj de la homa socio: politiko, scienco, ekonomio kaj ĉiaj temoj de la moderna vivo. **MONATO** estas plenkolora kvalitmagazino por postulemaj legantoj, kiuj volas esti funde informitaj.



Jen kelkaj bonaj kialoj por aboni ĝin nun:

- Nun novaj abonantoj ricevos **MONATON** dum tri monatoj senpage.
- Por **MONATO** raportas ne eksterlandaj ĵurnalistoj, sed lokaj esperantistoj, kiuj konas la tieajn fonojn.
- En **MONATO** la intelektularo de la Esperanto-movado diskutas, fojfoje vikle polemikas pri gravaj temoj de la nuntempa socio.
- **MONATO** estas la magazino en kiu ankaŭ vi povas aperigi viajn komentojn.
- **MONATO** plilarĝigas vian spektron de interesiĝo, pro aro da nekutimaj temoj prezentitaj en facile digestebla maniero.
- **MONATO** pligrandigas vian lingvokonon. Ĝi estas redaktita en bona hodiaŭa Esperanto.



Abonu ĝin nun!

La unuaj tri numeroj estos senpagaj!

Skribu al **MONATO**,
Lange Beeldekenstraat 169, B-2060 Antwerpen, Belgio,
aŭ rete al eldonejo@MONATO.be aŭ, eĉ pli facile,
uzu tuj nian formularon en
<http://www.esperanto.be/fel/mon/abonilo3.3.php>

AGRABLAN LEGADON!